

# ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 535

MAJO 1950

## PARIZO



**Ile de la Cité**



## ESPERANTISTA FERIO EN NORVEGUJO

Pasigu vian somerferion en Lofthus, Hardanger, la plej bela regiono de okcidenta Norvegujo. Dum la pasintaj 3 someroj 150 gesamideanoj el deko da landoj ĝuis tie neforgeseblajn tagojn. Venu vi ĉi-tiun someron!

Tuta kosto 125 norvegajn kronojn, ekskursoj 25 kronojn aldone. Frue anoncu vin. Oni povos akcepti nur 50 gepartoprenontojn. Skribu al

**Esperantista Ferio, poŝtkesto 132,  
Haugesund, Norvegujo**

## LA INTERNACIAJ FERIAJ E-KURSOJ

en Helsingør, Danlando

okazos 17-24 Julio, sub aŭspicio de UEA.

La kurskomitato invitas ankaŭ vin.

Pasintjare partoprenis 300 el 11 landoj.

Petu senpagan prospekton ĉe

**L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando**

## HUNGARLANDO PROGRESANTA

La dua mondmilito faris en Hungarlando teruran detruon, sed la laborantoj de la hungara popol-demokratio forigis per oferona laboro dum 2½-jara sukcesa plenumo de la 3-jara plano la ruinojn.


Per rapidlaboro ni rekonstruis niajn fervojliniojn kaj pontojn. Ni rekonstruis niajn fabrikejojn, publikajn konstruaĵojn kaj loĝdomojn.

Samtempe ni zorgis pri refreŝigejoj kaj sporteblecoj por la laborantoj. La novkonstruitaj refreŝigejoj kaj sportlokoj servas nun la ripozon, korpan hardigon kaj amuzadon de la vastaj popolamasoj.

La altnivelaj kultur-institutoj de la popol-demokratio atingis jam eĉ la plej malgrandan hungaran vilaĝon.

Kun informoj kaj klariga literaturo volonte servas la

**IBUSZ Fremdultrafika kaj Informa Oficejo,  
Deák Ferenc u.2, Budapeŝto V., Hungarujo.**



**L** por leono  
kun nobla aspekto  
De bestoj la reĝo,  
laŭ homa elekto.

Jen strofo el

## A B C LIBRO

POR ESPERANTISTAJ INFANOJ

Strofoj de Nenjo Rimanto.

Bildoj de Brian Leslie.

Kolorpresite sur kartono.

Ĝus eldonita de

**The Esperanto Publishing Co. Ltd.**

Afrankite : 1 ŝil. 1 p., aŭ

4 poŝtaj respondkuponoj.

*Mendu ĉe*

**Universala Esperanto-Asocio,**

**Heronsgate, Rickmansworth,**

**Herts., Anglujo**



# ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

43a JARO

Majo 1950

N-ro 535 (5)

Oficiala organo de  
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro :  
HANS JAKOB

Helpredaktoro :  
MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al  
ESPERANTO  
Palais Wilson, Genève, Svis.

Traduko kaj represo de artikoloj  
estas permesataj, kondiĉe ke oni  
citu la fonton. Por bibliografia  
celo oni sendu periodaĵon en kiu  
aperas represo el ESPERANTO,  
al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA  
kaj de la revuo ESPERANTO,  
abonado, reklamoj, anoncetoj  
sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO  
Heronsgate, Rickmansworth  
Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj  
(kun membreco kaj jarlibro  
12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en  
multaj landoj

#### Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 5 ŝil. : ½ paĝo 50 ŝil.  
½ paĝo 25 ŝil. : ¼ paĝo 12.5 ŝil.

#### Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ  
1 int. respondkupono por ĉiu  
duo da vortoj

Legantoj en 74 landoj

## LA ESTRARO KUNSIDIS

En la centra oficejo de UEA, en nia propra bela Esperanto-domo apud Londono, kolektiĝis dum la Pasko la Estraro de UEA por kiel kutime prijuĝi la raportojn pri la pasinta jaro kaj por plani por la venonta tempo. Alvenis la estraranoj el Belgujo, Francujo, Islando, Skotlando kaj Svedlando por trakti niajn problemojn kune kun la angla estrarano kaj nia ĝenerala Sekretario. Pri la farita laboro dum la kunsidoj povas rakonti la protokolo, kiu enhavas ne malpli ol 56 punktojn.

Kompreneble multaj el la pritraktitaj aferoj rilatas al teknikaj kaj rutinaj aranĝoj de la asocio, sed multaj ankaŭ celas novarangojn por la racia evoluo de nia asocio kaj de la Esperantomovado ĝenerale. La Estraro kun ĝojo konstatis, ke nia asocio kreskis, kaj ankaŭ ke al la universala kongreso en Paris jam aliĝis pli ol 1,700 personoj.

Kiel kongresurbon por 1951 la Estraro elektis inter la invitoj tiun el München por tiel manifestacii kunlaboron kun la rapide evoluanta movado en Germanujo.

Al la problemoj pri plibonigo de nia gazeto ni dediĉis tre detalan kaj seriozan pristudon. Ekde la jaro 1951 la formato de la gazeto estos 20×14 cm. laŭ la deziro de la plimulto de personoj, kiuj respondis nian enketon pri la gazeto, sed kompreneble ĝi havos pli da paĝoj. Krom tio ni akceptis novajn principojn por la redaktado, kies efikon oni vidos en la estontaj gazetnumeroj.

Alia decido kiu certe trovos bonan akcepton estas, ke la jarlibro ekde 1951 aperos jam en Januaro !

Pro la sukceso de la propagandvojaĝo de estrarano D-ro Lapenna, kiu jam vizitis Francujon kaj Islandon kaj dum Aprilo prelegis en Anglujo, la Estraro decidis komisi al li daŭrigi sian agadon ankaŭ dum la venonta agadjaro.

Jen estas kelkaj decidoj, sed ankaŭ aliaj certe havas preskaŭ la saman gravecon. Pri tiuj la membroj vidos la rezulton en la estonteco.

Resume mi povas diri, ke la kunsidojn karakterizis tipa optimisma atmosfero de evoluanta idea asocio. Nia asocio dum la pasinta jaro atingis rekordan membro-ciferon. La perspektivoj por la nuna jaro indikas, ke UEA baldaŭ havos novan rekordon—kondiĉe ke ni ĉiuj energie kaj konscie laboras.

E. Malmgren,  
Prezidanto.



Georges Agricola :

## PARIZAJ APARTAĴOJ

*J'ai deux amours,  
c'est mon pays et Paris !*

Skribi dikan libron pri Parizo ja estas facile, la temoj neniel mankas kaj neniam elĉerpigas. La vivo, la bulvaroj, la plezurejoj, la muzeoj kaj la atmosfero pariza, ĉio ĉi daŭre trovas priskribantojn kaj ĉiu trovas ion apartan. Se iu min demandas, kion mi precipe ŝatas en Parizo, tiam mi respondas senhezite : **la manieron vivi, kaj la librovendistojn laŭlonge de la Kajo de la Seno.** Mi ŝatas promeni tie, foliumante ĉiaspecajn librojn, serĉante kaj ofte trovante ion valoran. Au, se la tempo sufiĉas, mi iras al la vere pariza apartaĵo *la merkato de puloj!* (franclingve *Marché aux puces*).

La dimanĉo, kiu diferencas ĉi tie de dimanĉoj en aliaj landoj per tio, ke oni povas aĉeti nutraĵojn ĝis malfrua vespero, havas por mi apartan ĉarmon. Se mi ne estas okupita aŭ invitita mi vizitas merkaton. Kolektejo de ĉio malnova, uzita, forĵetita, tio kion la franco nomas *bric-a-brac*, objektoj plej diversaj, kiuj malgraŭ aspekto inter aĉa kaj mizera, trovas tamen amatoron. Se la sorto favoras, oni trovas perlon inter tiuj brokantaĵoj, sed oni devas esti pacienca, kaj cetere ne veni kun fiksita intenco trovi ion difinitan. En tio ĝuste troviĝas la ĉarmo, kiel la nemortema Goethe diris tiom trafe : *En arbaron mi foje promenis, sen intenco ion serĉi mi venis.*

Ekzistas pluraj tiaj merkatoj. Unu mi precipe memoras, ĉe la plej ekstrema parto de Montmartre, for de la plezurejoj, la *noktskatoloj*, kiel oni diras, ĉe la Porte Clignancourt. Fremdulo malofte tien iras. La tero estas kovrita per objektoj. Vendistinoj kun biblia aĝo kaj je proksimume sama pureco, sidas atendantaj interesaton. Malnovaj vestoj, feraĵoj, iaforte artobjektoj, vazoj por floroj kaj por malpli poezia uzo, elektraĵ akcesoraĵoj kaj kamentuboj ! Koro, kion pli vi deziras !

Tie ĉi regas la nepenetrebleco de ĉiaj objektoj. Malnovaj konatoj—objektoj kaj homo—sin tie ĉi eble renkontas. Mi iam posedis du malnovajn bildojn en ora kadro, reproduktitaĵojn litografajn. Unu prezentis Isabelon de Hispanujo en delikata situacio kun amiko, surprizitan de Marŝalo Prim. Alia montrant Marian Stuart en Fotheringay okaze de renkontiĝo kun Elizabeto. Idiotaj scenoj laŭ maniero de prezento. Nu, mi forigis ilin kontenta ne plu vidi ilin. Mirego . . . mi retrovis ilin sur la merkato de puloj, kaj elokventa vendisto nepre volis prui al mi, ke temas pri unuarangaj artobjektoj ! Tamen inter miaj kolektoj troviĝas pluraj objektoj, kiujn mi hazarde trovis tie ĉi, paginte kelkajn monerojn.



La Palais kaj la Pont au Change

Alia apartaĵo de Parizo estas la plenaera *Borso de Poŝtmarkoj* en la Elizeaj Kampoj. Ie mi legis, ke la Urba Registaro decidis aŭ decidis la malpermeson de tiu ĉi borso. Ĉiuj aŭde kaj ĉiudimanĉe apud la Carré Marigny tute proksime de Elizeo okazas la komerco de poŝtmarkoj. Tiu ĉi *Marché Marigny* originis en la jaro 1875, kiam kelkaj kolektantoj interkonsentis renkontiĝi tie ĉi por interŝanĝi duplikatojn. Iom poste alia poŝtmark-merkato en butikoj instaligis laŭlonge de la Avenuo Matignon, inter Rond-Point kaj Avenuo Gabriel. La ŝanĝiĝo de la vivkondiĉoj, sekvo de la militoj, altigis la valoron de la poŝtmarkoj, ne nur mone, sed kiel specon de *sekura ŝparo*, ne tuŝata de la inflacio. Ni konas la fenomenon en aliaj landoj, kie la rifuĝo en *objekto-valoroj* kreis strangajn formojn. La eksterordinara kresko de tiu ĉi merkato de poŝtmarkoj devigis la vendistojn peti rajtigon, kiu anstataŭ la ĝisnunan toleron, konsentitan sen formalaĵo. Kaj nun tiu ĉi pitoreska apartaĵo devas malaperi kaj senigi Parizon je io neekzistanta aliloke, kaj la filatelistojn je centro al kiu ili kutimiĝis. La amikoj de Parizo esperas ke kompromiso inter la filatelistoj kaj la urbarkitektoj estos trovata.

Mi preskaŭ forgesis memori pri alia apartaĵo pariza : la vendistoj de pentraĵoj en Montmartre kaj en Montparnasse. Sed pri tio, eble alian fojon !

Adre  
Franci  
Konj  
fr. fr.

Info  
turnu  
l'Arcac  
turnu

Kun  
utiligi  
litojn  
flankoj  
ajn ko

Se k  
la post  
liceo d  
kaj du  
postko  
ĉiu el t

Kar  
kolekti  
vojaĝa  
30% (t  
kunvoj

Por  
estos s  
julio.

Univ  
Civito  
havas  
aŭ 400  
estos e  
La imp  
tiu pre

La k  
restora  
entenas  
Angla  
manĝo  
La esp  
en la re

Kon  
estu efi  
farotan  
sekcioj  
la Espe  
la jena

1-a se  
duagra  
2-a  
industr



**35-a UNIVERSALA KONGRESO  
de  
ESPERANTO**

**Parizo, 5-12 aŭgusto, 1950**

**Adreso:** 62 Avenue de Clichy, Paris 18, Francujo.

**Kongreskotizo:** 2,000 fr. fr. Edzino 1,000 fr. fr. Junul(in)o ĝis 20-jara 500 fr. fr.

**Informoj pri loĝejoj:** Por rezervi hotelĉambrojn turnu vin al Wagons Lits Cook, 40 Rue de l'Arcade, Paris 8. En aliaj landoj ol Francujo turnu vin al la Agentejo Cook en via lando.

**Kunrestejoj:** La L.K.K. ricevis permeson utiligi la dormejojn de liceoj, el kiuj kelkaj havas litojn apartigitajn per lignaj vandoj sur tri flankoj. La L.K.K. ne povas certigi antaŭe al iu ajn kongresano, ke tiu ricevos apartigitan liton.

Se kongresano, kiu deziras partopreni en unu el la postkongresaj ekskursoj, volas okupi liton en liceo dum la nokto inter la 12a kaj 13a de aŭgusto, kaj dum la nokto, kiu sekvas la revenon el la postkongresaj ekskurso, li devos pagi 150 fr. por ĉiu el tiuj du tranoktoj.

**Karavanoj:** La karavanestroj, kiuj aranĝos kolektivajn vojaĝojn por minimume 30 kunvojaĝantoj, profitos rabaton de 40% anstataŭ 30% (nova franca regularo). Por minimume 10 kunvojaĝantoj la rabato restas 30%.

Por la individua vojaĝo la rabatiloj (*fichets*) estos sendataj kun la 3-a Oficiala Bulteno dum julio.

**Universitata Civito:** La loĝado en la Universitata Civito (*Cité Universitaire*) estos bona. La ĉambroj havas unu aŭ du litojn. Ĉiu lito kostas 350 fr., aŭ 400 fr. se oni volas havi la certecon, ke oni estos en ĉambro nur unulita kaj unupersona. La imposto kaj la servmono estas entenataj en tiu prezo.

La kongresanoj, kiuj deziras, povos manĝi en la restoracio de la Civito je la jenaj prezoj, kiuj entenas la servmonon: Matenmanĝo 40 fr.; Angla matenmanĝo 80 fr.; Tagmanĝo aŭ vespermanĝo 180 fr. (prezo, kiu entenas ankaŭ la vinon). La elspezoj de la restoracio povos esti pagataj nur en la restoracio mem dum la Kongreso.

**Kongresa laboro:** Por ke la kongresa laboro estu efika, la Komitato de U.E.A. decidis dividi la farotan laboron en kvar sekciojn de studoj. Tiuj sekcioj respondos al tiuj, kreitaj por la laboroj de la Esperantista Konferenco en 1937, kaj rilatas al la jenaj punktoj:

1-a sekcio: Esperanto en lernejoj: unuagrada, duagrada, superaj;

2-a sekcio: Internacia trafiko: komerco, industrio, fervojoj, poŝto, polico, foiroj, permaraj

kaj peraeraj rilatoj, turismo, banko, borso, dogano;

3-a sekcio: Teoriaj kaj aplikataj sciencoj: kemio, matematiko, fiziko, medicino, farmacio, arkitekturo.

4-a sekcio: Intelektaj interŝanĝoj: radiofono, stenografio, dokumentado, plastikaj artoj, humanismo, beletristiko, filozofio, teatro, kino, skoltismo, vegetarismo.

Ĉiu kongresano indikos al kiu el la kvar sekcioj li (ŝi) interesigas kaj en kiu li (ŝi) partoprenos.

La sekcio: Por organizi la laboron de ia fako, ĉiu sekcio havos prezidanton, sekretarion kaj protokolanton. Ĝi havos ankaŭ ĉefan raportanton elektitan de la estraro de U.E.A.

Ĉiu landa asocio devos siaflanke helpi al la laboro. Ĝi serĉos inter la kongresanoj tiujn, kiuj konsentos prepari raporton pri unu el la temoj de iu sekcio, kaj komisiis la plej kompetentajn, gvidi dum la kongreso, la nacian delegitaron.

La proceduro: Dum la Kongreso okazos du kunvenoj por la sekciaj laboroj. En tiuj kunvenoj la reprezentantoj de la landaj asocioj legos kaj klarigos sian raporton. Diskutado sekvos. Fine, la sekcio formulos la rezulton de la diskutado en apartaj decidoj kaj rezolucioj. En la ĝenerala kunsido la rezolucioj proponitaj de la sekcioj estos legataj kaj adoptataj post modifoj laŭbezono.

**Distraĵoj:** Ili bone progresas. S-ro R. Schwartz preparas profesionan trupon de artistoj por bonhumora spektaklo, kiu estos prezentata plurfoje dum la kongreso por ebligi al ĉiuj ĉeesti ĝin.

**Ekskursoj:** Ĉiuj ekskursoj estas aranĝitaj definitive. Ilia prezo estas la duono de tiu postulata de la privataj agentejoj danke al specialaj kondiĉoj interkonsentitaj.

(Ni deziras esprimi nian dankon, pro permeso reprodukti la bildojn, al Commissariat Général au Tourisme, Paris, (Londona fako) kaj al la fotografo A. Guillot.—Red.)

**Lastmomente**

**NIA VOJAĜANTA PROPAGANDISTO**

Ŝajnas, ke la restado de Prof. D-ro Lapenna en Islando estis grandega sukceso. Laŭ letero el Reykjavik ricevita en la Centra Oficejo:—

“Post unu horo Prof. Lapenna forflugos. Dum sia restado ĉi tie li multe agis por nia movado, por nia societo . . . ni gajnis grandegan trezoron spiritan. Mi korege dankas al la Estraro de UEA pro alveno de D-ro Lapenna.”

Raporto kun bildoj pri la vizito aperos en la Junio number de *Esperanto*.

De Pasko ĝis la 6-a de Majo D-ro Lapenna vojaĝas en Britujo, kaj poste li reiros al Parizo.



Ritchie Calder :

# HOMOJ KONTRAŬ LA DEZERTO

## RITCHIE CALDER ANKORAŬ EN NORDA AFRIKO

### PROJEKTO DE UNESKO

#### Tunizo

De Tunizo ĝis Kartago kondukas tramvojo per kiu oni povas transpasi 3,000 jarojn, se oni povas forgesi, ke Kartago estas nun laŭmoda antaŭurbo de Tunizo.

De kresto de monteto apud Kartago oni nun povas je unu direkto rigardi malsupren al la ruinoj de la Roma Kartago, kiu anstataŭis la Fenician urbegon, kaj kiu preskaŭ samgrade suferis de vandalismo dum la jarcentoj. Rigardante je alia direkto oni povas vidi eĉ hodiaŭ la matematikan precizecon de la Romanaj kampoj, kiuj anstataŭis la Fenician agrikulturan sistemon. Oni povas vidi ankaŭ la ŝlimaĵon kiu transformis la duoninsulon de Kartago en promontoron, kaj la vojon kiu nun transiras solidan teron, kie iam estis profunda akva fluejo.

Ĉar la Romanoj planis laŭ geometria metodo, eblas multon eltrovi pri la Romana Kartago. S-ro Charles Saumagne, Inspektoro Ĝenerala de la Franca Administrado, taksis ke en la 4-a jarcento p.K. la loĝantaro de Kartago ampleksis minimume 250,000 personojn, kaj ke la teritorio formanta la nunan Tunizion entenis la duoblon de la nunaj 3,400,000. Vegetaĵo abundis en lokoj, kiuj nun estas senkreskajaj montetoj kaj dezertaj etendaĵoj.

Pro tio, Saumagne nun estas unu el la *homoj kontraŭ la dezerto*. Li estas dediĉinta sian vivon al la restarigo de la produktiveco pri kiu li legis kiam li estis studento pri la Roma historio. Kion Kartago kaj Romo faris, tion denove oni povas atingi. Laŭ lia juĝo la naturo ne faras malbonon—nur la homoj tion faras. Kaj homoj povas rebonigi la teron.

De tiu monteto oni povas kvazaŭ studi la lecionon de Kartago. Komence la Fenicianoj estis maraj komercistoj, kiuj etendis sian potencon ĝis ĝi fariĝis milita danĝero por Romo. En la dua Punika Milito la Romanoj rompis ilian militan potencon. Senigite je sia mara potenco, la Kartaganoj reorientiĝis kaj laŭcele direktis sin al terkultivado, kaj iliaj instrulibrooj pri tio estis bone konataj de la Grekoj kaj Romanoj. Per sia praktike bazita scio ili transformis Nordafrikon en ĝardenon kaj grenejon. Tiel riĉaj fariĝis iliaj terenoj (nun forlasitaj kaj malmulte surkreskataj) ke ili estiĝis alispeca—nome ekonomia—rivalo al Romo, kiu en 146 a.K. konkeris ilin kaj ebenigis la civiton Kartago.

Konkerinte ilin, la Romanoj sekvis ilian ekzemplon kaj kultivis Tunizion tiel efike, ke sur ĝi povis ekzisti multe pli granda loĝantaro ol hodiaŭ. Krome, el ĝi fluis riĉa tributo al la Roma Imperio.

Tio estas denove farebla, kaj S-roj Saumagne kaj Tixeront (tiu lasta la ĉefingeniero de la hidraŭlika servo) klopodas realigi tiun revon. Ili kondukis min tra 1,000 mejloj de la internaj regionoj por montri kio estis, estas kaj estos. Kun ili mi vizitis Gafsa, la *Gardeno de la Hesperidesoj* de la Greka mitologio. Hodiaŭ ĝi estas riĉa oazo de daktilarboj, abrikotoj, grenadinoj, cerealoj kaj legomoj, kiuj subtenas loĝantaron de 12,000 personoj. Tio estas rezulto de eltrovemo kaj moderna tekniko. Funkcias pumpiloj kie iam estis akvofontoj, kaj sifonsistemo kondukas la dolĉakvon el unu puto en betonajn akveduktojn por irigacii vastan areon.

Mi vidis la naskiĝon de nova oazo. Inter la oazo Toseur (mielmonatula vizitejo!) kaj alia nomita De Gache, ĉe la bordo de la granda sal-ebenaĵo, La Chott Djerid, estas Castilia. El ĝus borita arteza puto akvo fluas en rezervejon. De tie ĝi iras en betonaj fluejoj por distribuiĝo tra la irigaciataj terpecoj, kie estas plantitaj junaj daktilarboj. Post 15 jaroj komenciĝos daktilrikolto. Intertempe la araboj kultivas legomojn kaj aliajn rapide ekspluateblajn kreskaĵojn sur la regajnitaj teroj.

Tamen S-ro Saumagne rakontis, ke kiam li unue venis al tiu dezerta loko antaŭ 25 jaroj li devis esti gardata de armitaj fusilistoj! Nur iom post iom li venkis kontraŭ ne nur la sablo, sed la homaj kutimoj, politiko kaj manko de mono.

#### Tripoli

Inter la Franca flago ĉe Ben Gardane kaj la Brita flago ĉe Zuaro estas *nenieslando* 40 mejlojn larĝa. Ĝi iam estis fortikumita zono sed nun ĝi prezentas bildon de ruinigitaj ŝirmejoj, tankoj, fortikaĵoj kaj defendpostenoj.

Tamen en Zuaro la britoj luktas por restarigi alian, pacan defendsistemon—kontraŭ la sablo, kiu domalte penetras en la urbon. Videblas nur tegmentoj de forlasitaj, sable dronintaj domoj, palmoj kies suproj elstaras kvazaŭ ili estus arbustoj. Antaŭ la okuloj realiĝas la sorto, kiu trafis Kartagon kaj aliajn civilizojn. Tia sorto minacis eĉ la ĉefurbon Tripoli antaŭ 40 jaroj, kiam la sablo penetris ĝis ĝia mezo.

Tio herboj la brit araboj arboj Unuig denove kreska Aldono nomita manga estas ĉiam a



Nur helpi detru defend nova organ 5 met estas herbo kvadr garda Se ĉio ĉirkaŭ zorge por bi kiel ŝi zono kome kelka la tas atingi lokoj planti dezert jaroj unuar tempo



Tio ne estas nepra. Per arboj kaj ligemaj herboj oni povas fiksi la dunojn. Ekzemple, kiam la britaj trupoj eniris la landon dum la milito, la araboj festis tion per hakado aŭ elŝiro de 1,000,000 arboj plantitaj de la italaj koloniintoj. Kiam la Unuigitaj Nacioj promesis memstarecon la junuloj denove jubilis per elŝirado de la verdaĵoj junaj kreskaĵoj de la nova defendsystemo de Zuaro. Aldone al la agoj de la homoj, troviĝas la kaproj— nomitaj de la britoj *nigraj akridoj*. Ili ne nur manĝas la foliojn sed eltiras la radikojn, kaj ili estas kvazaŭ *kvina kolono* de la insidanta kaj ĉiam al militanta sablo.



Tipo de primitiva irigaciilo, uzata en en multaj partoj de norda Afriko

Nun la arabaj aŭtoritatuloj faras sian eblon helpi en la batalo. Estas leĝe malpermesite detrui arbojn aŭ paŝti brutojn sur la ekkreskanta defendaĵo sur la dunoj. Ĉie estas signoj ke la nova batalo de dunfiksado estas en plena organizado. La tereno estas markita je kvadratoj 5 metrojn grandaj. La randoj de la kvadratoj estas plantitaj per strioj de malmola indiĝena herbo, kaj en la mezo estas novaj akacioj. La kvadratumitaj areoj estas protektataj de arabaj gardantoj kontraŭ homaj aŭ bestaj detruantoj. Se ĉio prosperos, post 10 jaroj riĉaj arbaroj leviĝos ĉirkaŭ Tripoli kaj kondiĉe ke la mastrumado estu zorge gvidata, ĝi povos esti fonto de lignaĵo, ĉu por brulaĵo, ĉu por aliaj celoj, kaj samtempe servi kiel ŝirmo kontraŭ la sablaĵoj. Ĉi tiu verda zono estas daŭrigo kaj plenumo de laboro komencita antaŭ 25 jaroj de la Italoj, kiuj malgraŭ kelkaj eraroj, tute kompreneblaj pro la noveco de la tasko, gajnis instruon el praktikaj spertoj kaj atingis konsiderindajn sukcesojn. En kelkaj lokoj grandaj avenuoj de eŭkaliptaj arboj, plantitaj de ili, kovras terenon, kiu iam estis dezerto. El olivplantejoj iniciatitaj antaŭ 12 jaroj oni ĉi jare komencis eksporti oleon; la unuan olivoleon el tiu regiono post la klasika tempo!

En Sidi Mersi troviĝas esplorstacio, kiu antaŭ 40 jaroj estis Turka kolegio por agrikulturo en la dezerto. Hodiaŭ ĝi staras en 180-akrea botanika ĝardeno, kie sennombraj specoj de indiĝenaj kaj eksterlandaj kreskaĵoj estas elprovataj pri adaptiĝemo al la severeco de la tero kaj klimato. Oni devas scii, ke en Tripolitania registriĝis la plej alta temperaturo en la mondo!

Ankoraŭ unu grava faktoro en la progreso de la pacmilito, estas la kvalito de la bestoj. Pasintjare la Agrikultura Ĉefadministranto vizitis Britujon por trovi taŭgajn virĉevalojn por interbredado kun la indiĝenaj specoj, kaj por tiraj kaj por rajdaj celoj. Do, ĝuste kiel la anglaj ĉevaloj profitis de arabsango importita antaŭ kelkaj jarcentoj, simile la procedo inversiĝas kaj la sango de anglaj ĉevaloj servos al la kreo de nova speco. Oni ne pensas sole pri la bredado de novaj ĉevalspecoj, sed ankaŭ pri la plibonigo de ĉiaj bestoj kaj birdoj. Maltaŭgaj bestoj kaj kortbirdoj manĝas same multe, kiel pli utilaj tipoj, kaj oni eksperimentas pri la plibonigo de la indiĝenaj tipoj, kiuj estas de malalta nivelo, por krei tipojn pli profitdonajn kaj pli taŭgajn por la lokaj kondiĉoj. El Sudafriko oni importis aviade specimenojn de la ĝibaj bovoj, Zebuoj, ĉar ili posedas kvalitojn tre utilajn en tia klimato kaj ilia sango povos plibonigi la indiĝenajn brutojn. Berberaj ŝafoj estas interbredataj kun Karakulaj ŝafoj (de kiuj venas la *perso-ŝafida* pelto).

La laŭcela bredado de bestoj tiel formas plian ligilon en la ĉeno de rekonstruo, ligilon inter la nomado kaj kultivisto en la komuna lukto. El plantoj kaj bestoj oni kreas armilojn por la senĉesa batalo kontraŭ malamikaj naturaj kondiĉoj.

(Ĉi tiu teksto estas kompilita de E. D. Durrant, kaj estas reproduktebla kaj tradukebla nur se oni citas la originalan fonton, la Anglan ĵurnalon *News Chronicle*, kaj *Esperanto* organon de U.E.A. La serio estas publikigata interkonsente kun Unesco.—Red.)

### Internacia Amikeca Ligo

I.A.L. (Angle I.F.L.) apoganta asocio de U.E.A., antaŭ nelonge produktis ilustritan broŝuron kun detaloj kaj informoj pri siaj ampleksaj aranĝoj sur la tereno de eksterlandaj ferioj. La celo de la organizaĵo estas krei senton de internacia amikeco kaj solidaro per senperaj kontaktoj inter homoj de diversaj popoloj, kun aparta atento pri homoj, kies monrimedoj estas limigitaj. La broŝuro donas detalojn kun tarifoj k.s. pri multaj ferio-centroj en Britujo kaj la eksterlando. Por ricevi ĝin oni sin turnu al: The International Friendship League, 3 Cromwell Road, South Kensington, London, S.W.7, Anglujo., menciante, ke vi legis la informon en *Esperanto*. **Skribu en Esperanto**, sed notu, ke la broŝuro estas en Angla lingvo.



# TRA LA MONDO ESPERANTISTA

## Kongreso en ĈSR

La VIII-a Ĉeĥoslovaka Esperanto-Kongreso okazos 27-29 de majo 1950 en Brno.

## Itala agado ĉe parlamentanoj

De antaŭ pli ol jaro Itala Federacio Esperantista klopodas ĉe la plej supera landinstanco por atingi konkretajn rezultojn favore al Esperanto. Per energia propagando oni varbis la simpation de tre multaj parlamentanoj kaj eĉ atingis tion, ke Deputito Enza Giacchera, prezidanto de Federalisma Parlamenta Grupo deklaris sin preta prezenti en Strasburgo rezolucion por Esperanto. Reveninte el Strasburgo, S-ro Giacchera sciigis, ke la propono ne trovis diskutlokon ĉar la delegitoj tie absolute ignoris la argumenton. Tial la afero disfalis. Neniu petis la parolon favore nek kontraŭe. S-ro Giacchera promesis denove prezenti la proponon en la venonta kunsido de la Eŭropa Konsilantaro en aŭgusto 1950. Tial necesas prepari la grundon per aktiva agado ĉe parlamentanoj en landoj, kie Esperanto estas plej evoluinta. Precipe agu ĉe delegitoj kies simpatioj estas al Federalisma Movado ĉar multaj italaj Esperantistoj okupas gravajn postenojn en la Eŭropa Federalisma Movado. Ŝajnas, ke la venonta kunsido de la Eŭropa Konsilantaro okazos en Torino anstataŭ Strasburgo. Se tio efektive okazos, oni povos pli oportune labori por nia afero.

Itala Esperanto-Federacio bonvenigus informojn pri samideanoj elstaraj en la federalisma movado. Skribu al tiu federacio ĉe: V. Saluzzo 44, Torino, Italujo. Aliaj gazetoj bonvolu represi!

## Nov-Zelando: Sukcesa Konferenco

De dec. 29, 1949 ĝis jan. 3, 1950 la Novzelandaj samideanoj en Wellington organizis sian 15-an Kongreson. Kun partopreno de la urbestro de Wellington, S-ro W. Appleton, kaj serio de interesaj kaj gravaj prelegoj, kun distra vespero, la kongreso evoluis laŭ la konata maniero, kaj estis elstara sukceso. La prezidanto de la Novzelanda Asocio, D-ro C. J. Adcock, lekciisto pri psikologio en la Universitata Kolegio Victoria, esprimis dankon al la Wellingtonaj samideanoj kaj ties prezidanto, S-ro Nelson Hill, pro la bonegaj aranĝoj.

## Koreo

Okazis 15-an de dec. 1949 Zamenhof-tago en Seoul, Koreo en la Pedagogia Universitato. Sur la foto, montranta la partoprenantojn, troviĝas meze de la 2-a vico S-ro Saliko, prezidanto de K.E.I., dekstre de li S-ro Stelaro Paik kaj dekstre de li S-ro D. M. Seok, Delegito de U.E.A. Mal-

dekstre de la prezidanto sidas la ĉefo de la Kulturministerio de la lando S-ro K. H. Sa, kaj maldekstre de li S-ro K. M. Ko, prezidanto de la pedagogia universitato de Seoul.



## Starigo de publikoficista asocio

En la kadro de S.E.A.T. (Sindikata Esperantista Asocio Tutmonda) fondiĝis asocio de Esperantistoj-Oficistoj en la Publika Servo. Stataj kaj urbaj oficistoj sin turnu al la provizora sekretario: Arpent, Syndicat des Municipaux de Bordeaux, Bourse du Travail, 44 Cours Aristide Briand, Bordeaux (Gironde), Francujo, de kiu oni povos ricevi ĉiujn informojn.

## Svisa Jarkunveno Esperantista Bern 25/26 III, 1950

Ĉeestinte jam dekojn da svisaj jarkunvenoj, mi diru, ke ni neniam tiom multe ridis, kiom en ĉi tiu *Esperanto-Tago*. Gaja atmosfero kreita de nia samideano-sorĉisto Hermann influis la tuton kaj la afera kunsido reflektis tiun ĉi gajhumoron ĝis la fino.

La ordinaraj traktotajoj evoluis metode kaj senhalte sub la lerta gvido de samideano Liechti (la *lumo el la oriento*). La eksigo de la agema prezidanto estis ĝenerale bedaŭrata, sed ne revokebla. Lin anstataŭas samideano Laederach en Zürich, kies grupo estos do ĉefgrupo. La Svisa Esperanto-Societo distingis Sinjorinon Fischer, la animon de la Esperanto-centro Metropol, elektante ŝin Honora Membro. F-ino Lilly Schaerer, la *febra* bernanino, estis honorata per transdono de belege farita broĉo kun nia emblemo, artaĵo ellaborita de samideano Rehmann en Genevo.

Resume, bonege sukcesinta maifestacio, kiu kunigis sepdekon da samideanoj svisaj.

H.J.



## Urugvajo

### Multe da aktiveco kaj oficiala subteno

**Zamenhofftago** : La samideanoj en Montevideo profitis la okazon por aranĝi unuarangan feston kun diversaj artprezentoj. Kun ĉeesto de la dana konsulo kaj konata rumana pacifisto Eugène Relgis, oni montris la filmon *Danlando* afable pruntitan de la Dana Legacio.

**Ekspozicio pri la infano** : Sekve de klopodoj de Prof. M. Fernández Menéndez, la societo en Montevideo organizis Esperanto-standon, kiu montris la aplikadon de Esperanto en infanaj rondoj por la plivastigo de la horizonto pri humanismaj konceptoj. Pli ol 200,000 personoj vizitis la grandan ekspozicion en kiu staris la Esperanto-stando, kaj inter ili oni disdonis 10,000 flugfoliojn pri Esperanto.

La oficiala instituto *Biblioteca Infantil No. 1* jam uzas Esperanton por internaciaj rilatoj. Ĝia infanlerneja gazeto *Compañeros*, kiu atingas ĉiujn lernejojn en la lando, jam aplikas Esperanton, kaj sekve de anonceto ricevis pli ol 1,000 respondojn. Tio devigis la Bibliotekon eldoni kolektivajn respondojn en formo de bulteno en Esperanto pri Urugvajo, kun ilustraĵoj.

**Instruistoj kaj Esperanto** : La 5-a Konferenco de la Urugvaja Federacio de la Instruistaro, al kiu apartenas la ŝtataj lernejinstruistoj de unuagrada klerigado, adoptis gravan decidon pri Esperanto. La rezolucio tekstas: "La 5-a Konferenco de Urugvaja Federacio de la Instruistaro instigas ĉiujn geinstruistojn en la Respubliko, eklerni la internacian idiomon Esperanto, lingvon facilan kaj neŭtralan, lerneblan sen profesoro, kaj kiu meritas la atenton kaj apogon de ĉiu edukisto, ne nur pro sia granda edukvaloro, kiun ĉiuj faksupertuloj agnoskas, sed ankaŭ kiel nesuperigebla ilo de interkomprenado kaj unuigo de ĉiuj popoloj de la mondo. Tiu ĉi Konferenco rekomendas al ĉiuj filiaj asocioj esplori la plej bonan manieron enmeti en frua estonteco la instruadon de la idiomu Esperanto en la lernejajn programojn, por ke tiu ĉi punkto povu esti traktata ĉe la venonta konferenco. Montevideo, 24 januaro, 1950."

## STUDENTA FERIO EN DANLANDO

### Universitata projekto pri Esperanto

Oni anoncas allogan programon de internacia tendaro arkeologia por studentoj en Danlando de la 30-a de junio ĝis la 20-a de julio, 1950. La aranĝanto de la tendaro kaj la posta restado en Kopenhago estas la grava dana studentorganizaĵo Dana Internacia Studentkomitato en kunlaboro kun Studenta Esperanto-Klubo.

En la venonta somero D.I.S. aranĝos entute 8 tiajn tendarojn, sed en la ĉi tie menciata tendaro;

**la oficiala lingvo estas Esperanto.** En la ceteraj la angla lingvo estos parolata.

Specialaj fakaj kvalifoj ne estas postulataj, sed se inter la aliĝantoj estas arkeologiaj, inĝenieraj aŭ arkitektaj studentoj, tiuj estos preferataj. La prezo de partopreno estas 80 danaj kronoj (4 anglaj pundoj). En tiu prezo estas enkalkulitaj: restado en Fredericia, trajna vojaĝo de Fredericia al Aggersund, la restado en Aggersund, la trajna vojaĝo de Aggersund al Aalborg, la ŝipa vojaĝo de Aalborg al Kopenhago, la restado kaj ekskursoj en Kopenhago kaj la vojaĝo de Kopenhago al Fredericia. La restado en Aalborg krome estas enkalkulita.

Interesatoj bonvolu sin turni **kiel eble plej baldaŭ** al: Dana Internacia Studentkomitato, La Universitato, Sct. Pederstraede 19, Kopenhago K, Danlando.

### Elementa Porinstruista Kurso en Havelte, Nederlando

En Havelte, bela vilaĝo en la provinco Drente troviĝas popolaltlernejo instalita en malnova kastelo kun tre alloga ĉirkaŭa pejzaĝo. En tiu lernejo la oficejo *Esperanto ĉe la Instruado* organizas specialan kurson de Esperanto por geinstruistoj. Konsiderinda donaco de unu samideano ebligis al ĝi proponi la kurson al nederlandaj instruistoj kaj profesoroj **senpage**.

La kurso okazos de 17 ĝis 29 de julio kaj estos gvidata de Andreo Cseh. Ĝi estos **nur** por profesiaj geinstruistoj kaj estos elementa. La celo estos instrui sufiĉe de la gramatiko por ebligi al la studentoj poste memstare daŭrigi la studadon.

Sciante, ke eble troviĝas kelkaj eksterlandaj instruistoj, kiuj volus profiti la okazon, la instancoj decidis, ke kelkaj lokoj povos esti rezervataj ankaŭ por ili, kaj tiuj, kvankam ne senpagaj, estos je favora prezo.

Interesatoj bonvolu sin turni al: Esperanto bij het Onderwijs, C. Krusemanstr. 43, Amsterdam-Z Nederlando.

### Somera kurso en Finnujo

Somera kurso de *Esperanto-Instituto de Finnlando* okazos apud la urbo Naantali 28.VII-3.VIII 1950. Loĝado en barakoj apud lago, kie eblas naĝi. Antaŭtagmeze ĉiutage du lecionoj aŭ prelegoj, kiujn faros eminenta lingvisto Prof. C. J. Ramstedt, Direktoro de la Instituto magistro Vilho Setälä kaj unu-du eksterlandaj prelegantoj. Posttagmeze okazos ekskursoj al la vidindaĵoj en la malnova ĉefurbo Turku kaj ĉirkaŭaĵoj. Por ricevi informojn oni sin turnu al *Esperanto-Instituto de Finnlando*, Onnentie 23, Helsinki-Kä., Finnujo. Danoj kaj aliaj sin turnu al L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando.



## TRA LA LIBRARO

\* = akireblaj ĉe U.E.A.



**The Clash of Loyalties** (La malakordo de lojalecoj) de Edmond Privat (eld. Geo. Allen and Unwin Ltd. London) prezo 5ŝil.

Oni invitis nian samideanon D-ron Privat prelegi anglalingve antaŭ ĉeestantoj ĉe la Jarkunveno de la Societo de Amikoj (Kvakeroj) en Edinburĝo 1948. La nuna verko konsistas el la prelega materialo, kaj oni retenis ĝian Anglan vestaĵon.

D-ro Privat majstre prezentas la tragedian fakton, ke malegoismaj kaj sinceraj homoj tre ofte permesas siajn individuajn virtojn servi al kolektivaj pekoj. De tiu fakto devenas nacia aroganteco, tria etiko, klasbatalo, religia bigoteco kaj amas-antaŭjuĝo. Per trafaj vortoj kaj epigrama stilo la aŭtoro akcentas la neceson krei novajn penskutimojn kaj agadmanierojn, kiuj pli efikas por kreskigi mondkoncion flanke de ĉiuj homoj tra la mondo. Por efektiviĝi tion, homoj nepre devos kultivi la *praktikan mistikismon*, kiu estas samspeca ĉe la koro de ĉiuj mondreligioj — ja ĉe la koro de ĉiu anime-emancipita homo, ĉar la *interna lumo* estas la sama en kaj por ĉiuj. Oni devas kontroli la funkciadon de la *interna lumo*, uzante la plej altan normon kaj ekzemplon, kiun oni konas kaj akceptas. Per praktikado de tia mistikismo oni estigas en si *senton* (ne nur penson) pri unueco kun la tuthomaro, kaj tiu sento naskas veran amon, kiu estas la dinamisma aspekto de la Veron. La ĉefa peko estas la rompo de anima unueco kaj la konsekvenca krimo kontraŭ la Amo.

En ĉapitro kun titolo *Novaj Kutimoj* D-ro Privat mencias Esperanton. Tutmonda helplingvo, libera de nacia tinkturo, helpus estigi la necesan senton pri unueco; kaj li ilustras ĝian profundan psikologian valoron, precipe ĉe geknaboj.

Al ĉiuj homaranoj, kiuj scias legi la Anglan lingvon, mi senhezite rekomendas ĉi tiun tre aktualan verkon. Ĝi estas studinda kontribuo rilate la problemon de mondpaco kaj la daŭra feliĉeco de la homoj.

W.J.D.

**Ricevitaj :**

**Kio estas Rotario-Klubo ?** Multobligita broŝuro kompilita de A. J. Sinclair, Te Awamutu, Nov-Zelando kaj eldonita de la tiea Rotario-klubo. Informa, interesa. Prezo ne indikita.

**Tähtitaivas :** N-ro 10, 1949. Astronomia gazeto en finna lingvo kun resumo de la artikoloj en Esperanto. Ĉe Astronomia Observatorio de Universitato de Turku, Finnlando.

Th. de Banville :

**L' ARTO SERENA**

Skulptisto, serĉu atendente la ekstazon, marmoron sen difekt' por fari belan vazon. Longtempe serĉu ĝian formon; iluziajn sur ĝi ne faru amojn nek batalojn diajn, Alcidon, kiu venkis la Neme-bestegon, Veneron naskiĝantan sur balzama tero; Titanojn ribelintajn kiujn venkis oni, Baŭson ridan, kiu jungas la leonojn per bremsa, kiun plektas branĉoj de vinbero: nek Ledon, kiu ludas en la cigna grego sub ombro de floranta laŭr', nek Artemizon lilie blankan inter akvoĵoj, en surprizo.

Ke ĉirkaŭ vaz' tro bela por la baŭhantinoj, verben' miksita kun la foliar' akanta florigu, kaj pli sube, mildaj virgulinoj duope iru per paŝado eleganta, kun brakoj pendaj kontraŭ la tunikoj, rektaj, kaj sur mallargaj, siaj kapoj, haroj plektaj.

Tradukis Lucien Thévenin.

Pierre Jalabert :

**I. LA PELVO**

De l'pelvo, kiel elspirigas fontmurmuro, kaj kiel sago de la akvoŝpruc' eksaltas, boranta la kurtenon streĉan de lazuro, hirtigas kaj refalas kiam kuro haltas; Simile, iam niaj revoj kies ĥoro (belega kiam ĝi ekflugas al lumbrilo) disfalas pro rompiĝo frua dum aŭroro, en pelvon de la Tempo, mutan, sen barilo.

**II. SIMILE AL PENTRISTO . . .**

Simile al pentristo, kiu nekonata, sur tiu vaz' etruska kun profil' rubena, kun arto sciis ligi, per peniko flata, la laŭron Italujan kun la roz' Atena; Liberigante vin per artifik' facila, el zorgo ordinara kaj profit-afero, ornamu cerbon per la rozo senutila. De via viv' ĝi estos lukso kaj fiero.

Tradukis Lucien Thévenin.

**Gvidilo Oberammergau :** ilustrita broŝuro pri la loko de la Pasio-dramo. Havebla ĉe: Geschäftsstelle per Passionspiele (Esperanto-Abteilung), Oberammergau, Germanujo, kontraŭ 1 rpk.

**Bonvenon en Konstanco :** faldfolio, informoj pri la loko de la ĉi-jara T.J.O.-Tendaro. Senpage ricevebla ĉe: Städt. Verkehrsamt, Konstanz, Germanujo.

**La Biblio de la Optimisto :** de David Kohn: tradukita de W. E. Baff. 28-paĝa broŝureto. Prezo nemontrita. Vendantoj: The Esperanto Foundation, R.R.1, Middleton, Wisc., Usono.

estas  
ne estVia  
mi, es  
la uza  
estas  
malav  
amban  
reprez  
formo

Mi

de pr

pionir

por n

legas

artiko

Esper

agus

koni

skribi

Tio

Esper

estas

dokum

ŝanĝi

povus

la art

mi du

Mi su

itale

germa

forma

la ori

ne ta

certe

itale

povus

lia or

En

preze

S.A.T

—kie

konse

estis

neŭtr





## NIA FORUMO

### PAROLAS LA LEGANTOJ

**Ĉu U.E.A. naciĝis?** Supre menciitan artikolon mi legis kun granda intereso. Generale mi aprobas vian starpunkton kaj bedaŭras la polemikon flanke de S.A.T. Ŝajnas al mi, ke multe da valora energio

estas perdata per misuzo por problemoj, kiuj fakte ne estas problemoj.

Via aranĝo de la jarlibro laŭ landoj, laŭ mi, estas preferinda ĉar pli praktika ankaŭ por la uzantoj. La apliko de la *ujo-* kaj *io-*formoj estas afero de gusto. Ambaŭ havas samtempe malavantaĝojn kaj avantaĝojn (mi mem uzas ambaŭ), sed ŝajnas al mi, ke U.E.A., kiel plej grava reprezentanto de nia movado, tute prave uzas la formon *ujo* laŭ la fundamento de nia majstro.

Mi malaprobas la esperantlingvan transskribon de propraj nomoj eĉ se nia majstro kaj la unuaj pioniroj tion komence faris. Estas terure—kaj por neesperantistoj tio aspektas ridinda—se oni legas *Siler, Gete, Ajnŝtajn* k.t.p. Verkinto de artikolo povas unufoje doni en parentezo la Esperantan proksimuman elparolon. Se oni ĉiam agus laŭ S.A.T. ĉiu Esperantisto estus devigata koni de ĉiuj lingvoj tiom, ke li estu kapabla ĝuste skribi naciajn nomojn per Esperanta ortografio. Tio estus ridinda ĉar li tiam ne bezonus Esperanton. Krom tio, la propra nomo de homo estas lia posedaĵo, registrita en oficialaj dokumentoj, kaj neniu havas la rajton ĝin iel ŝanĝi. Uzo de Esperanta formo eĉ voknomo eĉ povus kaŭzi dubon. Jen ekzemplo: tradukante la artikolon *La Observoj de D-ro Ĉu* (el Esperanto) mi dubis pri la nomo de la aŭtoro *Johano Papini*. Mi supozas, ke *Johano* estas Esperanta formo; itale lia nomo sendube estas *Giovanni*. En germana traduko mi devus aŭ uzi la germanan formon *Johann* aŭ—kaj tio estas eĉ ni la kutimo—la originalan, la italan. La Esperanta en tiu kazo ne taŭgas. Tamen mi lasis ĝin, ĉar mi ne tute certe sciis, kiu formo estas la originala. Se li itale nomigas *Giovanni Papini*, li meritas kaj eĉ povus postuli, ke nacilingva traduko aperu sub lia originala nomo.

*Bernhard Zenker, Germanujo.*

#### Pri la neŭtraleco

En la decembra numero de *Esperanto* vi prezentis la plej diferencajn starpunktojn de S.A.T. kaj U.E.A. Mi persone, estante laboristo—kiel multaj el la Stiriaj Esperantistoj—plene konsentas vian starpunkton. Antaŭ jaroj mi estis membro de S.A.T. kaj eliĝis el la tiama neŭtrala Esperanto-Societo por Stirio ĉar mi

estis *klaskonscia*. Sed la malĝojaj travivaĵoj en la lastaj jaroj konvinkis min, ke *klaskonscia* Esperantisto tamen povas kaj devas kunlabori en neŭtrala movado por konvinki la kontraŭulojn pri la propra sociala sinteno. Multaj burĝuloj fariĝas socialistoj, kaj ne ĉiu socialiste edukita homo fariĝas socialisto. Nur en la komuna vivado de ĉiaj homoj manifestiĝas la mankoj. Kaj nur el la spertoj oni povas lerni kaj evolui.

En la klaskonsciaj societoj antaŭ la mondmilito oni uzis Esperanton por certa celo. En ili regis pli da entuziasmo kaj celkonscio ol en la samtempaj neŭtralaj societoj, en kiuj estis parolata la nacia lingvo kaj malofte aŭdiĝis prelegoj kaj paroladoj. Kompare kun la pasinta neŭtrala societo en Graz, la nuna neŭtrala societo *Unuoco* estas viglega kaj aranĝas plej diversajn prelegojn, ne timante tuŝi kelkfoje tre delikatajn temojn. Ĝuste tio incitas al vigla diskutado. La energio kaj monero elspezata por tiu neŭtrala movado tute ne perdiĝis.

Ĉiu havu sian mondpercepton, sed klopodu harmonie kunvivi kun la plej diversaj perceptoj, ne provokante ilin.

*Josef Eder, Graz.*

#### Letervesperoj

*Melbourne,  
Aŭstralio.*

Miaj gekorespondantoj el diversaj landoj jam de longe letere diskutis kun mi gravan problemon pri anoncado de letervesperoj, kongresoj, ekspozicioj k.s. en Esperantaj gazetoj. Vojaĝo de gazeto al transmaraj landoj okupas plej parte preskaŭ tri monatojn, kaj la sendaĵoj de Esperantistoj al la letervesperoj, kongresoj, k.s. bezonas la saman tempon, ĉar nur plej simplajn sendaĵojn oni povas ekspedi aerpoŝte. Do tio kune okupas jam ses monatojn. Se oni konsideras, ke la gazetoj ne aperas ĉiutage, kaj pro tio la anonco ofte devas atendi preskaŭ monaton antaŭ ol esti presata, oni povas klare konstati, ke estas nepre necese sendi tiuspecajn anoncojn al la gazetaro 8 monatojn antaŭe! Precipe gravas atenti tion, ĉar ĉiuj scias, ke la plej interesa materialo estas tiu ricevita el la plej malproksimaj landoj. Nescio pri tio ofte estas la kaŭzo de malsukceso je la propagando. Mi do petas aranĝontojn de grupfestoj, letervesperoj kaj ekspozicioj atenti tiun gravan aferon.

*Dimitrije Brkić.*

(Aliaj gazetoj bonvolu represi.—Red.)

**Invito:** La redakcio invitas la kunlaboron de legantoj, per kontribuajoj al ĉi tiu paĝo. Ĉi tiu estu la loko, kie la membroj kaj legantoj esprimu siajn opiniojn pri la movado, organizaĵo kaj artikoloj aperintaj en la gazeto.



G. Agricola :

## LA NACIA LINGVO HINDA

Plej certe estas, ke nenialoke la lingva problemo estas tiom komplika, kiom en Hindujo, kie la Angla ludis, ludas kaj ludos ankoraŭ longan tempon la rolon de peradlingvo. Antaŭ iom da tempo la Nacia Kunveno Konstitucia Hinda trovis formulon post pasiaj debatoj, por solvi la problemon de tuthinda lingvo nacia. La formulo unue donas direkton, fiksitan en la konstitucio, laŭ kiu la problemo estu solvata. Oni ne bezonas atentigi kiom grava la afero estas por la estonteco de Hindujo, ŝtata federacio kun centra registaro. Per sekvado al la defendintoj de la provinca aŭtonomio absoluta, la unueco de Hindujo estus fariĝinta duba. Neniu problemo estas diskutita kun tiom da pasio, da amaro kaj patoso en la Hinda nacia kunveno, kiom ĉi tiu. Necesas la interveno de la plej respektindaj estroj hindaj por akceptigi fine la artikolojn de la nova leĝo kun granda plimulto.

La formulo diras nenion alian, ol ke *Hindi* estos la oficiala lingvo de la Hinda Unio. Kiel skribo estos uzata la malnova *Devanagri* deveninta de la Sanskrita alfabeto. Dum transira periodo de 15 jaroj la Angla lingvo restos ŝtata lingvo. La oficiala nomo de Hindujo estos la klasika *Bharat* apud kiu estos skribata inter krampoj la vorto *India*.

Tiu ĉi solvo estas kompromiso inter la ekstremistoj naciismaj kaj la kleraj progresemaj Hindoj. Ĝi krome estas granda cedo flanke de la Hindaj provincoj, kiuj ne uzas Sanskritlingvon, kaj krome ĝi estas rifuzo kontraŭ tiuj, kiuj deziras altigi *Hindustani* aŭ la parolatan, popolan lingvon, kiel nacian idiomon. La plej progresemaj elementoj kiuj deziras, ke la nova ŝtata lingvo estu skribata per latinaj literoj, restis en eta malplimulto.

La ĉefa problemo konsistis en tio, anstataŭigi la Anglan per alia lingvo, kiu estu la oficiala. La Angla ja estas parolata nur de malplimulto. Ĝi tamen estas rekonita, kiel la sola lingvo komprenata de ĉiuj kleruloj kaj, ke ĝi kunhelpis praktike je la politika kuniĝo de Hindujo. Ĝi ankaŭ garantias al Hindujo la plej facilan partoprenon en la internacia vivo. Malgraŭ tio, ĝi ne povus esti konservata kiel perada lingvo pro bone kompreneblaj kialoj naciaj kaj demokratiaj. Ankaŭ estus abismo inter regatoj kaj regantoj, se ambaŭ uzus malsamajn lingvojn.

Tamen kia lingvo devus esti elektata el la Hinda Babelo? Solvo laŭ, ekzemple, la Svisa modelo, akcepti ĉiujn lingvojn kiel ŝtatajn, do altigi la ĉefajn idiomojn kiel samrajtajn, ne estis eble, ĉar ekzistas en Hindujo pli ol dekduo da lingvoj kun granda amplekso de parolantoj kaj

ducento da dialektoj aŭ sublingvoj. La pligranda nombro de Hindoj uzas Indo-Arjajn lingvojn, originajn de la Sanskrita. Al ili apartenas *Hindi* kaj *Hindustani*, la parolataj lingvoj de Norda Hindujo, kiel ankaŭ la provincaj lingvoj de Bengalo—la Bengala—la lingvo de *Orissa*—la Panjaba—la Guĝerata, la Marata kaj la Asama. En la sudo de la lando oni parolas Dravidajn lingvojn kiuj havas nenion komunan kun la Indo-Arja lingvaro. Tio estas la Tamila, Teluga, Kanara kaj la Malajalama—la lingvo de la Malabara Marbordo. Ili estas parolataj de ĉirkaŭ 65 milionoj.

*Hindi* fakte estas la lingvo de la Unuigitaj Provincoj, de la Centra Hindujo, de Raĵputano, kaj de la provinco Behar. Ĝi estas la lingvo de la Hinda-centro, kaj pri ĝi jam parolis la Vedoj. La nomo devenas de la tempo de la mahometana konkero kaj ĝi signifas *la lingvo de la Hindoj*. La parola lingvo estas nomata *Hindustani* kaj la lando Hindustano (*stan*=lando). Ĝi estas uzata en centoj da dialektoj, kaj estas komprenata en simpligita formo en preskaŭ ĉiuj partoj de Norda Hindujo, eĉ de personoj uzantaj regionan idiomon, ekzemple Maratan aŭ Bengalan. Ĝi estas ia *lingua franca* de la simpla popolo, simile kiel la Angla ludas la rolon de *lingua franca* inter la Hindaj kleruloj. Oni kelkfoje lokas *Hindustani* range kun la *Urdu*-a lingvo sed tio ne estas konforma al realo. *Urdu* estas lingvo, kiu evoluis dum la regado islama kaj ĝi estas hodiaŭ oficiala de la mahometana ŝtato Pakistano. *Urdu* signifas *armea kampo*, kio jam indikas, ke ĝi devenis de la centrigita administracio kaj armeo de la mahometanaj estroj. Ĝia gramatiko baziĝas sur la *Hindi* sed granda parto de la vortaro kaj de la frazeologio devenis de la Persa. *Hindi* estas skribata de maldekstre dekstren (kun Araba literaro). Dum la du lastaj jarcentoj la *Urdua* evoluis je multe disvastigita literatura lingvo en kiu estis kreata vivanta trezoro arta, poezia kaj proza.

La kulturaj centroj de la *Urdua* estas Lahore, Allahabad kaj Lucknow. Oni tamen ne povas diri, ke la *Urdua* estis ekskluzive la lingvo de la Hindaj Mahometanoj. En la gepatra hejmo de la nuna ĉefministro Nehru, la *Urdua* estis uzata. Kontraŭ la *Urdua*, en kiun penetris multaj Persaj formoj, formiĝis Sanskrita literatura lingvo el kiu estis forigitaj ĉiuj vortoj kaj formoj Persdevenaj. Ilin anstataŭis puraj Sanskrit-vortoj. Oni povas rigardi ĝin kiel pur-*Hindi*. Ĝi tamen havas malmulte da komuneco kun la parolata lingvo de Norda Hindujo. Pro tiu ĉi

(al p. 71)



**LA JUBILEA LIBRO DE LA SVISA POŝTO**

La plimulto de poŝtadministrantoj pasintjare memorigis la 75-an datrevenon de la fondo de la Universala Poŝta Unio, ĝenerale per eldono de speciala poŝtmarko aŭ tuta serio. Povas esti, ke la Svisa Poŝto estas la sola, kiu je tiu ĉi okazo preparis belegan verkon du-voluman kaj grandformatan, kun titolo *Historio de la Federala Poŝto*. Ĝi estas en la germana kaj franca lingvoj. Ĝin redaktis Ernest Bonjour, Supera Poŝtinspektoro en Bern. La verko ne estas nura prezento de faktoj, sed simple informas pri ĉio rilatanta la poŝton de la decida jaro 1848 ĝis 1949. Ĉi tiuj volumoj, kun 750 paĝoj de teksto riĉe ilustrita, estas unika multrilate.

La enkondukaj konsideroj reiras ĝis la tagoj de la Roma Imperio kun ĝia majstre konstruita retaro de stratoj kaj sistemo de komunikigado, la *Cursus publicus* kiu atingis en la kvara jarcento de nia epoko longon de 120,000 km. Ĉi tiu grandioza verko disfalis en la konvulsioj de la popola migrado. De tiu fora tempo ĝis la moderna poŝta servo estas longa vojo. Ĝin pritraktas la unua ĉapitro. Dua ĉapitro skizas la juran bazon de la svisa poŝto servo post 1849 detale kaj precize. Grandan spacon okupas la priskribo pri la organizo de la poŝta administracio. La svisa poŝto fariĝis en 1849 parto de la federala administracio; antaŭe ĉiu el la 22 kantonoj (ŝtatoj) havis sian propran poŝtan servon. Ampleksan parton de ĉi tiu verko la kompilinto dediĉis al la personaro kaj la rilata politiko. Formado, socia prizorgo, salajro-kondiĉoj, ĉio kio tuŝas la aganton en la poŝto, de la simpla leterportisto ĝis la plej alta funkciulo, estas priskribata. Alia ĉapitro informas pri la branĉoj de la poŝta trafiko ĝis la tre ampleksa servo de la poŝta ŝparkaso (poŝtĉeko); kaj fine la vojaĝ- aŭ pasaĝer-poŝto de la ĉevalo ĝis la luksa aŭtobuso. Ne mankas paĝo pri la *Gothard*-poŝto, kies romantikon finis la moderna tekniko.

La internan servon traktas la dua volumo. Ĉio, kio necesas por transporti poŝtobjekton, de la transdono al la poŝto ĝis la ricevo ĉe la adresito, tere, surakve kaj aere, estas trovebla. Malgranda parto estas dediĉita al la influo de la milito en la internaciaj poŝtrilatoj kaj poste oni transiras al la granda ĉapitro pri la trafiko kun la tuta mondo.

*(de la antaŭa paĝo)*

kaŭzo estis tiom forta opozicio kontraŭ ĝia altigo kiel nacia oficiala lingvo. Oni timas, ke oficiala lingvo de la regantoj estos alia ol tiu de la regatoj, simile kiel dum la tempo de la Brita regado. Nur se *Hindi* estos instruata sen doktrineca mallarĝanimeco ĝi povos akiri la honoran lokon en la vivo de la nacio, kiun oni esperas.

Ĝin enkondukas priskribo pri tio, kiel la Poŝto procedis antaŭ la fondiĝo de la Universala Poŝta Unio, kiu ja reguligas ĉi tiun gravan parton de la servado. La fondiĝo de U.P.U., la plej grava okazaĵo en la grandioza evoluo de la poŝta servo, trovas dignan atenton.

Fine estas ĉapitro, kiu aparte interesas la amikojn de la poŝtmarko. Reproduktaĵoj de la svisaj poŝtmarkoj evidentigas la evoluon de la gusto kaj teknika prilaboro. La statistikisto trovas sian plezuron en longa serio de tabeloj tuŝantaj ĉion, kion oni povas kaj devas esprimi per nombroj. Ankaŭ la raciigo, postulo de la nuntempo, estas fake priskribata.

Kiu nun kredas, ke ĉi tiu *Historio de la Svisa Poŝto* estas enuiga teda legaĵo, tiu grave eraras. Flua agrabla stilo, malproksima de oficiala raporto, igas la eldonon leginda verko, fidinda fonto de dokumentado kaj, pro ĝia luksa prezentado kaj ĝiaj ilustraĵoj, vera juvelo en biblioteko.

*Hans Jakob.*

**INTERNACIA KONKURSO 1950**

Jen la stato je la fino de Marto. Jam kvar landoj atingis siajn kvotojn kaj multaj aliaj bone progresas.

Lando ..	Kvoto	Poentoj	%
1. Hispanujo ..	600	770	128.3
2. Maroko ..	250	280	112.0
3. Izraelo ..	250	270	108.0
4. Urugvajo ..	250	260	104.0
5. Belgujo ..	2000	1937	96.8
6. Sudafriko ..	250	235	94.0
7. Finnlando ..	1800	1655	92.0
8. Svislando ..	1300	1165	89.6
9. Svedlando ..	4900	4250	86.7
10. Brazilo ..	2200	1841	83.7
11. Britujo ..	12500	9996	79.9
12. Germanujo ..	2000	1595	79.7
13. Italujo ..	1450	1140	78.6
14. Nederlando ..	5100	3891	76.3
15. Francujo ..	5200	3724	71.6
16. Aŭstrujo ..	700	495	70.7
17. Aŭstralio ..	900	630	70.0
18. Hungarujo ..	1400	895	63.9
19. Irlando ..	250	155	62.0
20. Usono ..	3100	2015	65.0
21. Kanado ..	250	150	60.0
22. Danlando ..	3100	1695	54.7
23. Nov-Zelando ..	850	465	54.7
24. Argentino ..	1000	530	53.0
25. Islando ..	660	305	46.2
26. Norvegujo ..	1500	745	43.0
27. Pollando ..	4650	1760	37.8
28. Egiptujo ..	250	10	4.0

Pro la neeblo fari transpagojn la landoj Ĉeĥoslovakujo, Bulgarujo kaj Jugoslavujo estas forigitaj el la konkurso.

**Ju pli multe da subteno, des pli interesa kaj alloga la gazeto. Aliĝu mem, kaj aligu viajn amikojn al U.E.A., la plej granda Esperantista organizaĵo en la mondo !**



## SENTENCOJ DE SALAMONIAKO

## POR DIFINITAJ PERSONOJ

**Dudekjara fraŭlo** : Evidu fraŭlinon, kiu scias pudri, sed ne kudri.

**Bela fraŭlino** : Kaŝite kisata—ne priklaĉata !

**Senhonta koketulo** : Post vangelserĉo, sangelverŝo !

**Edzo** : Ne decas al viro kritiki trikotadon.

**Edzino** : Ho ! la enuiga surgenuiga laboro de la domestrino !

**Patro de familio** : Ne povas esti tro da mono en la zono.

**Knabaĉo** : Bona bato per longa lato.

**Najbaro** : Loĝas apude kaj klaĉas alude.

**Neŭtralulo** : Demokrate agas, sed sencele vagas.

**Internaciisto** : Mordanta pulo estas sennaciulo !

**Sennaciulo** : Laŭ Lanti, estu for la neŭtralismo ! sed ne okazu skismo en Marksismo !

**Hollywood-geaktoroj** : La juna paro de la nuna jaro.

**Kvakero** : Oni ne estu fanfarone bonfarema !

**Venkito** : Estas mefitaodoro en nepropa gloro.

**Drinkemulo** : Ĉies fincelo estas ies vinkelo.

**Esperanto-lernanto** : Kiu forgesas, ne progresas.

W.A.G.



## LITERATURA KONKURSO

## Aldona regulo al la Provizora Regularo

(Vidu pp. 51/52 *Esperanto* aprilo)

Art. 7. Kopirajto. Kiam temas pri traduko, la tradukinto devas havigi de la posedanto de la kopirajto skribitan permeson fari la tradukon, kaj skribitan permeson por publikigo en *Esperanto* se tion oni deziras fari. (Tiu permeson oni alfiksu al la manuskripto).

La ensendo de originala verko indikas, ke U.E.A. rajtos eldoni la verkon, se ĝi tion deziras.

## KIO ESTAS VIA V.K. ?

Responde al pluraj invitoj, ni malfermas novan rubrikon. Temas pri via vort-kvociendo—mal-longe V.K. Provu vian radikkonon ! Kompilas S-ro A. S. Beuker, Bijenhofstraat 34, Leeuwarden, Nederlando.

Divenu la ĝustan el la signifoj donitaj ĉe la sekvantaj vortoj. Se vi ĝuste elektas ĉiujn, via V.K. estas 100. Tamen deprunu 20 pro ĉiu miselekto aŭ nescio.

1. **Abismo** estas (a) profundegaĵo, (b) speco de arbo, (c) kemia elemento.

2. **Absolvi** estas (a) plenumi, (b) liberigi, (c) deklari iun senkulpa.

3. **Lasciva** estas (a) malgaja, (b) volupta, (c) esprimanta mokon.

4. **Tempesto** estas (a) momento, (b) uragano, (c) ŝtormo.

5. **Zefiro** estas (a) birdo, (b) milda vento, (c) speco de multekosta ŝtono.

Difinoj sur paĝo 76.

## Konkurso por artistoj

Jen bona okazo por tiuj, kiuj scias desegni aŭ pentri. UEA deziras pretigi poŝtkartojn, kies celo estas propagandi la Asocion (ne la lingvon). Kun la celo ricevi bonajn desegnaĵojn ĝi starigas konkurson laŭ la jenaj kondiĉoj :

1. Ĉiu desegnaĵo estu laŭ la proporcio 7.50 × 13.50 cm., sed la grandeco de la projekto ne gravas. Ĝi tamen ne estu tro granda por ke ĝi ne difektiĝu en la poŝto.

2. Ĝi estu presebla per ne pli ol du koloroj kaj oni indiku tiujn.

3. Ĉiu provo devas atingi la oficejon, Universala Esperanto-Asocio, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo ne pli malfrue ol la 15an de Julio 1950. En la sama koverto, sed ne sur la desegnaĵo mem, oni donu la nomon kaj adreson de la verkinto.

4. Oni ekspozicios taŭgajn desegnaĵojn ĉe la Pariza Kongreso kaj kongresanoj havos la eblecon voĉdoni pri ili. La fina decido estos farata (pro teknika taŭgeco) de la Estraro de UEA, kiu konsideros la opiniojn de la kongresanoj.

5. (a) Al la verkinto de la plej taŭga desegnaĵo oni aljuĝos premion de Esperantaj libroj aŭ membreco de UEA laŭ valoro £2.

(b) Al ĉiu, kies desegnaĵon oni uzos, oni aljuĝos premion laŭ valoro £1. Membroj en malproksimaj landoj povas konkursi laŭ tiuj kondiĉoj eĉ post Julio.

6. La kopirajto pri ĉiu akceptita desegnaĵo apartenos al UEA.



**CEREMONIO DE  
POPOL-RAJTO**

En beleta vilaĝo Wishford en la Angla graffando Wiltshire oni konservas malnovan tradicion de popolrajto en formo de ĉiujara ceremonio je la 29-a de majo.

Je tagiĝo la vilaĝanoj kolektas branĉojn de kverko en la apuda arbaro Grovely kaj per ili ornamas siajn domojn. Akurate je tagmezo la Kverkpoma Klubo komencas la feston per procesio ĉirkaŭ la vilaĝon kaj tra la stratetoj.

Oni rakontas, ke unu el la grafoj de Pembroke antaŭ longe dekretis, ke la vilaĝanoj ĉesu kolekti lignon en la arbaro, kiu estis parto de lia bieno. Oni diras, ke "neniu viro kuraĝis malobei". Tamen virino, iu Grace Reed, spitis la dekreton kaj defiis la nobelan moŝton, defendante la malnovan rajton, kolekti lignon en arbaro Grovely. Tiu agado triumfis kaj la vilaĝanoj daŭre kolektis la lignon laŭ bezono.

En la moderna ceremonio unua iras standardo kun devizo asertanta la rajton Grovely; sekvas kvar virinoj portantaj surkape ligno-faskojn. Poste iras viroj kun ankoraŭ faskoj da kverkligno sur la ŝultroj, kaj laste paŝas gaje vestitaj infanoj de la vilaĝo. La tuta procesio paŝas malrapide



[Foto de Reece Winstone

preter la kverk-ornamitajn dometojn kun pajltegmento, preter la 13-jarcentan preĝejon kaj fine al la kermeso,\* kiu donas amuzon kaj distron dum la resto de la tago.

La ilustraĵo montras la procesion apud la malnova preĝejo kaj oni vidas simblan figuron de la ceremonio tuj en la antaŭo.

\* kermeso: granda publika fest-manifesto, kutime en formo de budoj, karusejoj, pajacoj, k.s. (Angle: fair).

**HIGIENO—MALHIGIENO ?**

Norvega kirurgo, D-ro Gangsaas en Bergen, laŭ raportoj en la gazetaro faris interesan malkovron sekve de polemiko, kiu komenciĝis kaj furiozis pri la malhigiena kutimo mantuŝi nutraĵojn en la butikoj post fingrumado de moneroj.

La granda plimulto el ni verŝajne memoras la gepatran admonon—kaj pluraj el ni jam certe uzis la saman—ke ni ne metu monerojn ĉe la buŝon ĉar tio estas malhigiena. Tial povas aspekti stranga, eĉ ofenda, la aserto de la nomita doktoro, ke moneroj estas tiel senbakteriaj, kiel se ili estus trempitaj en desinfektaĵon !

D-ro Gangsaas esploris monerojn prenitajn hazarde el plej diversaj lokoj, kaj liaj mikrofotoj montras, ne nur ke kupraj moneroj estas tute kaj senescepte senbakteriaj, sed krome, ke la fingroj kaj aliaj objektoj estintaj en kontakto kun ili, estas simile puraj. Esplorinte kuprajn monerojn, la doktoro turnis sian atenton al nikelaj moneroj, kun la sama rezulto. Tamen, farinte testojn ĉe diversaj moneroj, malnovaj, malpuraj, kaj freŝaj, li faris la mirigan konstaton, ke la malnovaj, ŝajne bakteriplenaj, fakte estas higiene puraj, dum la freŝaj, brilantaj moneroj havas bakteriojn !

Multajn esplorojn faris la doktoro, ĉe pordansoj, balustroj, telefonoj k.s. kaj la rezultoj montris, ke eventuale trovitaj bakterioj ne estas danĝeraj. La doktoro deklaris, ke nazituko efektive estas tre danĝera dissemilo de bakterioj. Homo, kiu uzas nazitukon kaj poste manpremas al amiko, aŭ prenas—ekzemple en butiko—nutraĵojn por servi al kliento, estas vera minaco al la socio !

M. Otiel.

**Invito :** La redakcio invitas interesajn kontribuojn al *Esperanto*. Artikoloj estu ne pli longaj ol mil vortojn, kaj prefere estu akompanataj de fotoj. Tradukoj kaj fotoj, pri kiuj ekzistas kopirajtoj, povas esti reproduktataj nur kun la skriba permeso de la posedanto de la rajto.

Ni bonvenigas temojn kultur-klerigajn, sciencajn, folklorajn, kaj artikolojn spegulantajn al nunajn vivkondiĉojn de la popoloj en ĉiuj mondpartoj. Por taŭgaj, uzeblaj artikoloj, U.E.A. faros modestan honorarion (por eksterlandanoj en formo de libroj aŭ abono).



### ENIGMA KONKURSO N-ro 48

Solveju oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 20-A, Avenue Molière, Brussel-Forest, Belgujo.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 44-a konkurso : S-ro I. Ekström (Finnl.) 119 p., D-ro W. Manders (Ned.) 118 p., S-ro J. Escaré (Franc.) 112 p.

Sekvas post ili : F-ino A. Reiné 108, S-roj J. Soyeur 108, L. Staal 107, A. E. Rosengard-Hansen 105, G. Turin 105, F. O. Bevan 101, G. Englert 99, Fr. Couwenberg 97, F-ino A. C. Nilssen 97, S-ino N. Koudijs-Mooco 96, F-ino N. Hanson 96.

#### Solvej de la enigmoj en Konkurso N-ro 46 :

**N-ro 98 :** Glora la celo, sankta l'afero,  
La venko—baldaŭ ĝi venos ;  
Levos la kapon ni kun fiero,  
La mondo ĝoje nin benos.

**N-ro 99 :** Pli bona, pano sen butero, ol kuko sen libero. Slosilvortoj : aperitivo, glicerino, miligramo, abnegacio, motoristo, antipatio, materialo, spontanea, bataliono, intervjuo, kontrasto, psikiatro, metropolo, antologio, obstrukco, gutaperko, striknino, septembro, braceleto, dokumento, tornistro, klasifiki, akuzativo, pulĉinelo, akvaforto, fotografi, astronomo, aeroplano, inkluziva, pleonasmo, mikrofono, ebrigaĵo, determini, areometro, monumento.

**N-ro 100 :** tridektrifoj tri plus tri trionoj estas cent ; skribu cent per kvin aliaj egalaj ciferoj.  $111-11=(2 \times 2 \times 2+2)^2=4! \times 4! : 4-44=5 \times 5 \times 5-5 \times 5=6! : 6-6! : 6 \times 6=7 \times (7+7) + \sqrt{7} \log 7=88+8 + \sqrt{8+8}=99 + \sqrt{9 \times 9} : 9=100.$

**Enigmo N-ro 104 :** lando, etero, mito, etulo, maro, ajlo, laŭdo, rido, blato, fero, akto, aso, legio, ordo, kono, kazo. Metu unu literon antaŭ ĉiun vorton, nomitan ĉi-supre, sed tiel, ke vi trovas 16 novajn vortojn kaj la unuaj literoj de la novaj vortoj en la donita sinsekvo formas proverbon.

**Enigmo N-ro 105 :** terni, daŭri, busto, atuto, relo, aso, masko, timono, kalo, anaso, mento, vera, tro, omo, turo, kadro, cedi, rizo, sero, robo, greno, aso, legio. Metu du literojn antaŭ ĉiun vorton, nomitan ĉi-supre, sed tiel, ke vi trovas 24 novajn vortojn, kaj ke la duaj literoj de la novaj vortoj en la donita sinsekvo formas proverbon.

**Enigmo N-ro 106 :** a - a - an - an - be - bi - bri - bro - bu - ci - co - co - de - di - do - e - e - em - fen - ge - ge - go - gu - ĝi - i - kul - las - li - li - lo - lo - lo - ma - mo - na - na - ne - ne - ni - ni - ni - ni - nig - no - no - nom - nu - o - o - o - o - o - or - or - po - ra - ra - skur - so - sta - ta - ta - ta - ti - ti - to - tu - ve - ve - ve - vi. El la ĉi-supraj 72 silaboj formu 24 sesliterajn vortojn, kies unuaj literoj formas verson, bone konatan de ĉiu Esperantisto. La klarigoj (multaj figuraj) de la vortoj estas laŭ la *Plena Vortaro* 1 facile fleksebla, 2 malklaraĵo, 3 ne havanta devigan okupon, 4 malofte vizitata loko, 5 fortike starigi ion abstraktan, 6 regiono regata de iu scienco, 7 homo ankoraŭ ne sperta en ia profesio, 8 iom post iom malgrandiĝi, 9 malobservi sciencan regulon, 10 delikata diferenco, 11 vivi senemocian vivon, 12 komenca skizo de ideo, 13 grado de io kompare al alia afero, 14 esti tuj finiĝonta, 15 akre, satire kritiki, 16 nedifinita kvanto, 17 rilate al misteraj fenomenoj, 18 malagrabligi, 19 plej alta grado, 20 provizora haltejo, 21 malfacile komprenebla afero, 22 memkomprenebla, 23 kolosa, 24 esprimo de ies estra volo. (ensendis S-ro T. K. Slade—Anglujo).

**GRAVA : ŜANĜO DE ADRESO :** Se vi ŝanĝas vian adreson TUJ INFORMU U.E.A. Ni konstante ricevas petojn pri aperintaj numeroj, kiujn ni jam ekspedis al malnova adreso. Tio kaŭzas nenecesajn elspezojn al ni.

### ESPERANTO KAJ RADIO

*Mallongigoj :* I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

<b>Ĉiutage</b>	14.45-15.00	Praha. 25.5m. I. Ĉeĥoslovaka Radio Esp.-sekcio, Stalinova 12, Praha XII.
	18.45-19.00	Sofia. 39.11m. P. Radio Sofia.
	21.00-21.15	Praha. 31.41m. P.
<b>Lundo</b>	05.30-05.35	Wien. 513m., 31m., 41m. I.
	16.30-17.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. Rádio Ministério da Educação e Saúde, Rio de Janeiro, (DF), Brazilo.
	21.50-22.00	Praha. 470m. P.
<b>Mardo</b>	11.50-11.55	Bern. 48.66m., 31.46m., 13.94m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 28, Bern.
	17.35-17.40	Bern. Kiel je 11.50, sed anst. 13.94m. sur 25.39m. (Krom la unua mardo).
	23.45-24.00	Gvatemalo. 49m. I. Estación Cultural de la Voz de Guatemala, Guatemala Cd. C. Ameriko.
<b>Merkredo</b>	13.20-13.35	München. 315.8m., 412m. kaj 48.70m. kaj Nürnberg (?). K. (ĉiun duan merkredon). Radio München, Kulturabteilung, Rundfunkplatz 1, München, Bayern, Germanujo.
	19.15-19.30	Warszawa III. 48.23m. I. Pola Radio, Warszawa, Koszydowa 8.
	21.50-22.00	Praha kiel lunde.
	22.00-23.00	Praha II. 470m., 315m. Verda Stacio nur la unuan merkredon. Stalinova 12, Praha XII, ĈSR.
<b>Ĵaŭdo</b>	11.55-12.00	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
	17.35-17.40	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
<b>Vendredo</b>	08.05-08.20	Paris. 347m. K. (ĉiun duan vendredon).
	14.30-14.45	Graz. 240m. K. Radio Graz, Esperanto-Voĉo, Zusetalgasse 14/a, Graz, Aŭstrujo.
	15.40-15.55	Wien. 203m., 25m., 31m., 41m. I. Ĉiun duan vendredon. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV.

**Klarigo**—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la hor sistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horojn.

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

**Gravega :** La instancoj en Francujo subite sciigis sian decidon ĉesigi la dissendojn el Parizo. Ni petas amasan alskribon al la stacio por peti daŭrigon de tiuj elsendoj. La adreso : Radio-diffusion Francaise, 118 Champs Elysées, Paris 8, Francujo.

#### SYNNØVE SOLBAKKEN

Bjørnstjerne Bjørnson

Plaĉa Norvega rakonto tradukita de

Edith kaj Aŭgust Weide

23. 3p. aŭ 9 rpk. afrankite

Mendu ĉe U.E.A.

N-ro 2  
La j  
Jarlibr  
DELEC  
Ballar  
41  
Baturi  
Ru  
Bauru.  
23  
Belem.  
A  
Porto 1  
48  
Salvado  
Wallin  
11  
Aarhus  
Lohja.  
Besan  
Cl  
Münch  
T  
Schloss  
H  
FD  
Badaj  
91  
Barcel  
P  
Valenc  
V  
Budap  
A  
VD  
FD  
B  
Szendr  
sa  
Milan  
T  
Napoli  
N  
Pisa.  
FD  
Torinc  
T  
Rotter  
T



# UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Herongate, Rickmansworth, Herts., Anglujo  
OFICIALA INFORMILO

N-ro 226.

3-an de Aprilo 1950

La jenaj informoj ne troviĝas en la Unua Parto de la Jarlibro 1950, kiu eliris en la unua semajno de Aprilo.

## DELEGITOJ

### Aŭstralio

**Ballarat** (Victoria). FD (Magio) : D. Brkić, c/o Allen, 411 Havelock St.

### Brazilo

**Baturité**. FD (Kooperativismo) : A. Lopes de Souza, Rua 15 de Novembro 336.

**Bauru**. FD (Filatelo) : L. A. Bartholomeu, Caixa Postal 232.

**Belem**. FD (Komerco) : F. Falcão, Avenida Braz de Aguiar 363. Tel. 4263.

**Porto Alegre**. FD (Muziko) : P. E. Simon, Avenida Bagé 484.

**Salvador**. FD (Spiritismo) : H. Pitta, Caixa postal 945.

### Britujo

**Wallington** (Surrey). FD (Filozofio) : J. V. Moffat, 113 Bute Road. Tel : 2715.

### Danlando

**Aarhus**. VD : J. H. Momme, Lundbyesgade 3.

### Finnlando

**Lohja**. D : M. Malmivuori, Metsolank. 7.

### Francujo

**Besançon**. FD (Instruado) : M. George, 3 Chemin de Chaudanne.

### Germanujo

**München**. VD : H. Koch, Deisenhofener Str. 10/II m. Tel : 4566-660.

**Schloss-Holte**. D : H. Dresselhaus-Brockmann, Schloss-Holte nr. 173 bei Bielefeld. Tel : 141.

FD (Stenografio) : La D.

### Hispanujo

**Badajoz**. VD : S-ino M. Gallardo Gómez, Santo Domingo 91. Tel : 1342.

**Barcelona**. FD (Librokomerco) : F. Montserrat, C. Provenza 75, 2, 3.

**Valencia**. FD (Konstrumaterialo) : R. Quilles, San Vicente 186. Tel : 13808.

### Hungarujo

**Budapest**. D : S. Németh, Budapest XX, Pestszenterzsébet, Also-határnt 135. Tel : 297-300, et. 45 kaj 83.

VD : XXII : I. Pados, Antal u. 11.

FD (Aeronautiko) : J. Bangha-Varga, Budapest XI, Bartók Béla str. 50.II. 1a.

**Szendrő**. FD (Religio) : Pastro Béla M. Koppány, r.k. sacerdot.

### Italujo

**Milano**. FD (Kemio) : D-ro G. Crippa, Via C. Poma 10. Tel : 570.441.

**Napoli**. FD (Turismo) : N. Tancredi, Piazza S. Maria la Nova 19. Tel : 24-734.

**Pisa**. D : R. Lenzi, Via della Faggiola 5.

FD (Filatelo) : La D.

**Torino**. FD (Asekuro) : D-ro M. Bonino, Via Saccarelli 31. Tel : 74961.

### Nederlando

**Rotterdam**. FD (Urbokonstruado) : M. de Waard, Taandersstraat 19 B, Rotterdam W.

### Pollando

**Radom**. FD (Esp. propagando) : W. Misiewicz, Spokojna 10.

**Warszawa**. VD : T. Rogalinski, ul. Karłowicza 1/7 m. 100.

FD (Arkitekturo) : K. Tyminski, ul. Górnoslonska 45 kol. V dom. 24.

FD (Bakteriologio) : D-rino I. Lipska, ul. Nowogrodzka 82 MIH. Tel : 70405.

FD (Soci-asekuro) : F. Glinski, Miedzylesie a. Warszawa, ul. Sosnowa 12 m. 6.

FD (Turismo) : T. Pleskaczynski, Warszawa 22, Niemcewicz 5a log. 7.

### Svedujo

**Göteborg**. FD (Sindikataj aferoj) : A. Dahlqvist, Lövsögsgatan 18. Tel : 168045.

**Limhamn**. FD (Maristaj aferoj) : H. Lindkvist, Ö. Ansgarigatan 79.

**Varberg**. D : K. Rohdin, Drottninggatan 47. Tel : 421. VD : F-ino G. Mellberg, Göteborgsvägen 7. Tel : 1764.

### Usono

**New York**. FD : (Baháismo) : D. M. Earl, 17 Brown Hall, North Brother Island, Bronx, New York 54.

## SANĜOJ

### Brazilo

**Caraguatatuba**. FD (Migrado) : vakas.

**São Paulo**. FD (Bibliotekoj) : vakas.

FD (Teozofio) : vakas.

### Britujo

**Dartford**. D kaj FD : nova adreso : 32 Bow Arrow Lane.

**Halifax**. FD (Socikredito) : nova adreso : 24 Moorlands View, Savile Park.

**Tipton**. D : vakas.

### Bulgarujo

**Sofia**. FD (Vegetarismo) : nova adreso : Pirdop (Sofia).

### Francujo

**Muret**. D : vakas.

### Germanujo

**Büsum**. D kaj FD : nova adreso : Mittelschule.

**Wiesbaden**. D : nova adreso : Hallgarter Str. 10 p.r.

### Hungarujo

**Belápatfalva**. FD (Religio) : vakas.

**Budapest**. VD : XI : vakas.

### Nederlando

**Hulst**. D : vakas.

**Limmen**. D : vakas.

**Rotterdam**. FD (Arkitektaj aferoj) : vakas.

## NOVA DUMVIVA MEMBRO

Eberhard, F-ino A., Thun, Svislando.

## MEMBRO-SUBTENANTOJ 1950

227. Jayet, F-ino E., Morges, Svislando.

228. Bloemendal, S-ro A., Deventer, Nederlando.

229. Latimer, S-ro R. F., Nowra, Aŭstralio.

230. Avoth, S-ro J., Porto, Portugalujo.

231. Tronchon, S-ro H., Casablanca, Maroko.

232. Szabad, S-ro S., Stockholm, Svedujo.

233. Blid, S-ro A., Nynäshamn, Svedujo.



- 234. Carrfors, S-ino S., Bromma, Svedujo.
- 235. Boffejon, S-ro H., Antwerpen, Belgujo.
- 236. Huisjes, S-ro H., Gasselternijveen, Nederlando.
- 237. Assayag, S-ro S., Port Lyautey, Maroko.
- 238. Thollet, S-ro C., Port Lyautey, Maroko.
- 239. Collier, S-ro J., Westgate-on-Sea, Anglujo.
- 240. Dodson, S-ro H., Willaston, Anglujo.
- 241. Fraser, F-ino R., Ilford, Anglujo.
- 242. Gibson, D-ro W. A., Bathgate, Skotlando.
- 243. Wilkinson, F-ino D., Huby, Anglujo.
- 244. Worcester, S-ino D. M., London, Anglujo.
- 245. Kalmanowicz, S-ro J., Norrahammar, Svedujo.
- 246. Freitas, S-ro A. W. de, Rio de Janeiro, Brazilo.
- 247. Gaio, S-ro M. J., Rio de Janeiro, Brazilo.
- 248. Andersson, F-ino D., Linköping, Svedujo.

**DONACIOJ.** C. Pot 60s., N. Colling 1s. 6p., F-ino N. van Sloun 3s. 6p., S-ino V. Reed 10s., A. E. Newman 6s.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

**STATISTIKO.** Jen la stato de la membraro je la fino de Marto, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Marto 1949:

	1949	1950
Asociaj membroj	3805	3383
Individuaj membroj:		
MJ .. .. .	545	575
MA .. .. .	3327	3472
MS .. .. .	298	256
Patronoj ..	15	14
DM .. .. .	179	196
HM .. .. .	57	56
	4421	4569
	8226	7952

CECIL C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

**ALVOKO AL DELEGITOJ**

En la novembra numero de *Esperanto* ni publikigis urĝan alvokon al niaj delegitoj, ke ili sendu al la Centra Oficejo en Rickmansworth detalan informon pri interesaj servoj faritaj dum la lastaj jaroj.

Al tiuj, kiuj jam respondis, ni esprimas nian koran dankon. La informoj ricevitaj estas tre kuraĝigaj kaj interesaj kaj ni jam kompilis propagandan prelegon por uzo en grupoj kaj antaŭ kunvenoj. (Por akiri tiun prelegon vin turnu al via Landa Asocio aŭ Ĉefdelegito).

Ni denove nin turnas al la delegitoj, kiuj ankoraŭ ne respondis. Ju pli da informoj ni posedas pri la utilaj servoj de nia delegitaro, des pli valora la propaganda efiko. Atentu tamen, ke ni deziras informojn **nur pri utilaj aŭ interesaj servoj.** Alvenis ĉe ni multaj leteroj kiuj raportis nur la ordinarnajn rutinajn servojn konatajn, kiuj—malgraŭ ilia valoro kiel bazo de nia Servo—ne estas utiligeblaj por propaganda celo en prelegoj k.s.

Ni volas admoni niajn modestajn delegitojn, ke en ĉi tiu afero sinretiremo ne estas rigardebla kiel virto! Do, al eventualaj respondontoj . . . antaŭdankon!

**ESPERANTISTA VIVO**

**Jubileo**

**Holleman** S-ro J. V., D. de U.E.A. en Groningen, Nederlando estis 60-jara je 11.2.50 kaj tiam estis 40 jarojn Esperantisto.

**Naskiĝoj**

**Kalmanoviĉ**, al Ges-roj, en Norrahammar, Svedlando, la 5-an de marto filino **Ernestine-Lea.**

**Piha**, al Ges-roj S. M., en Alexandria, Egiptujo la 12-an de februaro dua filo **Saŭl.**

**Fianĉiĝo**

**King-Guilliard.** S-ro A. V. R. King, D. de U.E.A. en Bristol, Anglujo kun F-ino G. M. Guilliard, ankaŭ en Bristol; 22-an de februaro.

**Geedziĝo**

**Coupez-Jarmo.** S-ro Rudolph C. Coupez en Novjorko, Usono, (antaŭe en Bruselo, Belgujo) kun F-ino Vivi L. Jarmo de Hålsingvorg, Svedlando. Ambaŭ malnovaj Esperantistoj kaj Esperanto estas ilia hejmlingvo.

Al ĉiuj ni deziras esprimi niajn sincerajn gratulojn kaj bondezirojn.

**Niaj Mortintoj**

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj, al kies parencoj ni esprimas nian profundan kondolencan.

**Austerlitz** S-ro V., en Bardejov, ĈSR., 27-nov. 1949, 76-jara. Multjara membro kaj iama D. de U.E.A.

**Brown** S-ro W., en Lytham, Anglujo, 12-feb., 79-jara. Fervora apoganto de la brita movado kaj samideano dum 40 jaroj.

**Hudson** S-ro P. T. B., en Melbourne, Aŭstralio, 31 dec. 1949, 72-jara. Vojaĝis per Esperanto en preskaŭ ĉiuj partoj de la mondo inkluzive de Japanujo, Ĉinujo kaj la Amerikoj. Li gardis intereson pri la movado ĝis la fino.

**Krumpholtz** S-ro J., en Pferov, ĈSR., 3 marto, 79-jara. Pioniro de Esperanto en sia lando, kunaŭtoro de lernolibro, eminenta pedagogo kaj kunlaboranto de multaj sciencaj societoj kaj revuoj.

**Scalenghe** S-ro J., en Torino, Italujo, 25 feb. post mallonga malsano. Verkis artikolojn, poeziaĵojn kaj vaste korespondis. La Torinaj samideanoj intencas starigi memortabulon sur lian tombon.

**Schooleman** S-ro J., en Rotterdam, Nederlando 7 marto, 62-jara. Vicĉefdel. kaj FD de U.E.A. Multjara kaj fidela laboranto por nia afero.

**Thomas** S-ro D., en Cardiff, Kimrujo, 7 marto, 89-jara. **Thévenet** S-ro A., en Vallauris kaj Eze, Francujo. Eminent artisto, konata kiel *la potisto d'Eze* (dato kaj aĝo ne komunikitaj).

**Yeomans** S-ro J. F., en Kirby-in-Furness, Anglujo, 82-jara. Iama D. de U.E.A.

**KIO ESTAS VIA V.K. P (vidu p. 72)**

**Difinoj**

1. (a) **Abismo** estas profundegajo. Ĝi krome estas uzata figure: *Miaj planoj falis en la abismon.* = miaj planoj fiaskis.

2. (c) **Absolvi** signifas en religia senco: pardoni kaj nuligi ies kulpajn, kaj en ĝenerala senco: senkulpigi aŭ deklari iun senkulpa pri io, kion oni rigardas peka (kiel ekz. ŝtelo, krimo k.t.p.)

3. (b) **Lasciva** estas neoficiala vorto verŝajne prenita el la itala lingvo. Vidu la januaran n-ron de *Esperanto* sur p. 11. Ĝia signifo estas *volupta, sentumĝuema.*

4. (c) **Tempesto** estas sinonimo de *ŝtormo*, do fortega ventego.

5. (b) **Zefiro** estas milda vento, kiu agrable tuŝetas la hararon.



# ANONCETOJ

*Kosto : du pecoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkuponon por ĉiu duo da vortoj.*

**Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.**

**Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.**

**Ne-katolikoj**, kiuj deziras informojn pri la katolika kredo, povas ricevi ilin senpage per la Internacia Katolika Informejo. Sekretariejo: Fraterhuis, Loonopzand (N.Br.), Nederlando.

**Serĉataj**: Historio de la lingvo universala (Couturat, Drezen), Mitridates (Adelung—lingvara traktato), Discussiones (Peano) kaj Progreso (Couturat, 1908-11). D-ro Zeballos Morales, Fray Marcos, Urugvajo.

**Senpage instruist(in)oj, -pacifist(in)oj** ricevos aktualan intereseigan informilon "Lernejo por Civilizeco". Aldonu poŝtrespondkuponon (aŭ 2 UL-p-kuponojn). Cerri LpC, C.P.89, Varese, Italujo. Afranku filatele.

**La nova Kristanismo** bazita je la doktrino de sveda scienculo kaj reformanto Em. Svedenborg, enportas la certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri la vera religio bazita je la Biblio kaj ĝia interna senco. Informas: J. B. Vlach, Lužická 21, Praha XII, Ĉeĥoslovakujo.

**Antonio Pastor**, Ercilla 49, 5, Bilbao, Hispanujo, deziras interŝanĝi il. pk. kun ĉiuj landoj. Nepre respondos.

**Flegisto** (dipl. A. kaj B.) deziras korespondi kun gekolegoj pri fakaj temoj. Adreso: S-ro S. P. Duin, A. L. Dyserinckstraat 58, Haarlem, Nederlando.

**Fremdultrafika Servo en Belgujo**, Konijnenperken 109, Bosvoorde-Brussel, Belgujo, sendas Esperantajn turistajn prospektajn, prizorgas malmultekostajn Esperantistajn hotelojn.

**Korea studento** (filmartisto) serĉas korespondadon tutmonde, precipe pri la filmarto kaj prezentaĵoj post la dua mondmilito. Sangki Paik, P.O. Box 18, Seoul, Koreujo.

**Poŝtmarkoj**, aeraj kaj aliaj, deziras interŝ. Zulfikarpašić, Postfak 30, Slav. Požega, Jugoslavujo.

**Krishnamurti**—Informojn pri liaj instruoj kaj la maniero akiri liajn librojn en diversaj lingvoj. Soares Guedes, C.1208, Luanda, Angolo (Portugala Okc. Afriko).

**Por malmultekosta restado** (gejunuloj) en Nederlando, Belgujo, Francujo, Svislando, Luksemburgo, informiĝu ĉe: Turista Servo, Konijnenperken 109, Bosvoorde-Brussel, Belgujo. Tel: 48.44.36. Petu prospekton de la Ferio-gastejoj (rp.k.).

**Filmisto deziras korespondi** pri filmtemoj. Skribu: Stelmaszyk Zygmunt, Kino "Lot", Jelenia Gora, Pollando.

**Inventintoj, sportuloj, amikoj de mekanikaj ludiloj!** Revuo por junuloj serĉas kunlaborantojn kaj korespondantojn en la tuta mondo. Skribu al: "Mechanikus" Poŝtkesto 27, Rothenburg-Tauber, Germanujo.

**Kuracisto 60-jara** deziras korespondi pri rimedo fariĝi 100-jara. D-ro Wegener, Hollestr. 1, Essen, Germanujo.

**Saldanha Carreira** plezure ricevos informojn pri "Esperanto en la elementaj lernejoj": Saldanha Carreira, Avenida de Grao Vasco 33, r/c, Lisboa, Portugalujo.

**Por propaganda celo** mi deziras ricevi el la tuta mondo vidajkartojn. Ĉiu kiu sendos nepre ricevos de mi belan poŝtkarton. R. M. Dhonau, Avondale, Cromer Road, Sheringham, Norfolk, Anglujo.

**Monata Internacia Kurso por Junuloj** (franclingve) 15 julio-15 aŭg.; 15 aŭg.-15 sept. Temo: Signifo de Belgujo sub historia, literatura, arta, ekonomia, socia vidpunktoj. Informoj ĉe: Turista Servo, Konijnenperken 109, Bosvoorde-Brussel, Belgujo.

**Komencantoj kaj progresintoj** deziras korespondi, prefere per ilustritaj poŝtkartoj. Skribu al S-ro J. H. Momme, Lundbysesgade 5, Aarhus, Danlando.

**Por 5 respondkuponoj** mi sendas belajn pm. de Germanujo, ankaŭ interŝanĝas. Karlo Schmaüder, Im Hag 6, Stuttgart-Untertürkheim, Germanujo.

**100 gegrupanoj** deziras korespondi kun tuta mondo per ilus. poŝtkartoj; garantias respondon. Esp.-korespondanda grupo, Oka-Shinmachi 260, Hirakata, Osaka, Japanujo.

**Amatorfotografisto** deziras interŝanĝi leterojn, fotojn kaj ilustritajn poŝtkartojn tutmonde. Valdemar Lampinen, Outokumpu, Finnlando.

**Du danaj junuloj** bicikle vojaĝos al Amsterdam—Breda Bruxelles—Paris—Mons—Laon—Calais—London—Dover—Ostende—Antwerpen, kaj volonte survoje vizitos gesamsideanojn en la tempo 23a Julio—14a Aŭgusto. Skribu tuj al Kurt Sorensen, Labaek 39, Holbaek, Danujo.

**Spertajn kursgvidantojn** por la sezono Septembro 1950—Majo 1951 serĉas Norvega Esperantista Ligo, Boks 942, Oslo, Norvegujo.

**Ĉeĥoslovakino**, 30-jara, deziras interŝanĝi vidajkartojn tutmonde. Fulvia Tihláríková, Legionárská 15, Brno, Ĉeĥoslovakujo.

**25-jara tramisto** deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Speciale pri vivmanieroj, sporto, sed ankaŭ aliaj demandoj. Ingemar Kastbom, Svalebogat. 47 E, Göteborg, Svedlando.

**50 gekursanoj** deziras interrilatojn kun eksterlando. EKO-Centro Karger, Behelfsheim 100, (22b) Schifferstadt, Germanujo. Afranku filatele.

**Portugalujo**. 34-jara viro petas korespondadon kun gesesperantistoj en Brazilo kaj Venezuelo, kiuj povos faciligi "alvokleteron" por enmigri en iu el tiuj landoj. Respondu aviadile al A. F. Mordido, Seixal, Portugalujo.

## POR VIA ALBUMO

aŭ por via korespondanto

La plej belaj bildpoŝtkartoj ĝis nun aperintaj.

Fotoj de slovakaj popolkostumoj en nigro-blanko aŭ en naturaj koloroj, kun teksto en Esperanto.

Por serio el dek la prezoj estas:

Fotoj 3 ŝil., afranko 2p.

Kolorbildoj manpentritaj 10 ŝil., afranko 3p.

★

Mendu ĉe U.E.A.



Majstroverko el Hispanlando

# SANGO kaj SABLO

de

Vicente Blasco Ibañez

tradukita de

Ramón de Salas Bonal

Per ĉi tiu romano, pulsanta je vivo, Ibañez tenas spegulon antaŭ la multekolora vivo iberia. La leganto partoprenas en la viglo, la koloro, la pasio kaj ankaŭ la mizero de la hispana popolo, kaj akiras ian komprenon pri ĝia animo.

Verŝajne neniu alia verko permesas tiel intiman bildon, kaj estas tiel detale informa, pri la aranĝo de la taŭrfestoj (bovbataloj), kaj traktas tiom objektivite pri la timoj, luktoj, amoj, ĵaluzoj kaj etaj gloroj de la toreadoroj.

Treege neordinara verko. Streĉe interesa.

Prezo : 9 ŝilingoj, afranko 6 pencoj

*Mendu tuj ĉe*

**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

# SOMERA UNIVERSITATO

(Malmö 1948)

ENHAVO

Enkonduko	-	-	-	-	-	Rektoro Karl Söderberg, Svedujo
La laponoj kiel kultura popolo	-	-	-	-	-	Profesoro B. Collinder
La kimraj artofestoj	-	-	-	-	-	R. Rossetti
El la mirinda naturo	-	-	-	-	-	C. Støp-Bowitz
Astronomiaj sensacioj	-	-	-	-	-	Profesoro K. Lundmark
Ĉefprincipoj de la nuntempa internacia juro	-	-	-	-	-	Profesoro D-ro Ivo Lapenna
El la fronto kontraŭ la malamikoj de la kulturplantoj	-	-	-	-	-	D-ro P. Neergaard
La kalevala kulturo	-	-	-	-	-	Vilho Setälä
Pri la sveda kooperativa movado	-	-	-	-	-	Rektoro S. A. Stahre
Du svedaj humoristoj kaj unu hungaro	-	-	-	-	-	D-ro F. Szilagy

La libro enhavas la tekstojn de la prelegoj en Malmö

Prezo 4 ŝil. Afranko 2p.  
(17 respondkuponoj)

*Mendu ĉe*

**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo